# Fragmentoj el Historio de Esperanto-Movado en Miskolc

**István Pál 1913 - 1988**

**László Pásztor 1989 – 2013**

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

2013

**István Pál – László Pásztor**

# Fragmentoj el Historio de Esperanto-Movado en Miskolc

**Traduko**

Originale verkita en Hungara Lingvo

Titolo de la originala verko estis:

**SZEMELVÉNYEK A MISKOLCI ESZPERANTÓ MOZGALOM TÖRTÉNETÉBŐL**

Verko de **István PÁL** (1913-1988) aperis: en 1988.

**László Pásztor** kompletigis la historion (1988-2013). La du hungarlingvajn tekstojn esperantigite li aperigis en detaloj, en la retrevuoj Északmagyarországi Hír kaj Nordhungaria Informo.

István Pál - László Pásztor

# Fragmentoj el Historio de Esperanto-Movado en Miskolc

## Unua kvaronjarcento de Esperanto 1887-1912

### /De la Varsovia libro ĝis la Miŝkolca librovendejo/

### Lingvo de Zamenhof – ankaŭ Johano Bolyai

Kiam en 1960 en Miskolc kiel iu programo de la 3-a Nordhungaria Esperanto-Renkontiĝo oni inaŭguris memortabulon de la strato Zamenhof, tiam loĝantoj de la ĉirkaŭantaj domoj apenaŭ sciis ion pri la esperanta lingvo kaj ties kreanto. Ili ne sciis, ke antaŭ la lingvo de Zamenhof ekzistis 174, post tio 116 lingvoeksperimentoj, kaj el inter tiuj nur Esperanto restis vivkapabla. Eĉ tion ili ne sciis, ke inter jaroj 1772 kaj 1913 troviĝis 7 hungardevenaj lingvokreantoj, inter ili Johano Bolyai, mondfama hungara matematikisto, kiu faris sian lingvoplanon. La gramatiko de Zamenhof, kies ŝlosilo estis la genia afiksosistemo, jam en 1878 pretiĝis, sed nur post la praktika perfektigo sukcesis eldoniĝi la 14-an de julio 1887 en Varsovio.

### La unua kvaronjarcento

En 1897 profesoro Gabrielo Bálint instruas la lingvon kaj Ábel Barabás eldonas lingvolibron en Cluj / en 1897-98 /. Paŭlo Lengyel aperigas en urbo Szekszárd en 1900 la unuan hungarian esperantan revuon la „Lingvo internacia", poste ĉi tiun sekvas en 1904 la „Esperanto", en 1907 „ La verda standardo." En la unuaj jaroj de apero de „Lingvo internacia estis gimnaziano en Szekszárd Ludoviko Király (de 1904), elstara personeco de la miŝkolca Esperanto-Movado. Li tie aŭdis unue pri la lingvo Esperanto de sia kara amiko kiu estis la filo de Paŭlo Lengyel. En la lando la Esperanto-vivo vigliĝas. En 1901 en Budapeŝto fondiĝas la unua Esperanto –grupo, en 1911 parlamenta interpelacio aŭdiĝas en intereso de Esperanto, poste en 1912 fondiĝas la Hungaria Landa Esperanto- Societo kaj en 1913 la Societo de la Hungaraj Esperantistaj Laboristoj.

### Gravaj homoj de Miŝkolc

Apenaŭ pasas kelkaj jaroj post la varsavia apero de la unua gramatiko de Esperanto, kiam naskiĝas Ludoviko Király la 19-an de Aŭgusto 1889 en Szekszárd, Julio Baghy en Szeged la

13-an de januaro 1891, Kolomano Kalocsay en Abaújszántó *la 6-an de Oktobro 1891* kaj Ludoviko Győry Nagy en Gömőrmihályfalva la *12-an de marto 1892.*

Ili ĉiuj havis malvastan kontakton kun Esperanto kaj Miskolc ĝis vivofino.

Kolomano Kalocsay finis la bazlernejon en Miskolc sur placo Sankta-Anna, dum 8 jaroj lernis en la nuna Földes kaj Lévai- gimnazioj, en la pli lasta abiturentiĝis en 1909.

Ludoviko Győry Nagy – pro la tien enoficigado de la patro – en Miskolc daŭrigis de septembro 1906 siajn gimnaziajn studadojn kaj estis samklasano kaj sambenkano de Kolomano Kalocsay. Tiutempe komenciĝis ilia amikeco, kiam ankoraŭ ne konis Esperanton.

*En la jaro 1910-a* Ludoviko Király / Kőnig / estis universitatano en Budapeŝto. Post 1904, jam duafoje li aŭdis pri Esperanto, kaj de lia iu samklasano li ricevis lecionojn kaj lernolibron. Post ties unu monata trastudado, lernado, somere de 1910 dum iu fervoja vojaĝo kun eksterlandaj esperantistoj li povis jam daŭrigi perfektan konversacion.

Julio Baghy /kiel lia patro Julio Baghy / estis aktoro, multfoje rolis en Miskolc en ensemblo de diversaj direktoroj. Li estis notario de la landa aktorsocieto. Lian aktoran roladon oni menciadis inter eminentuloj de la ensemblo. La gepatroj rolis kaj loĝis en 1899-1905 en Miskolc, en la „Rákóczi-domo” kune kun la juna Julio Baghy.

## La unuaj okazintaĵoj - Libroj en la montrofenestroj

El inter la jam menciitaj, Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy translokiĝis al Budapeŝto de siaj miŝkolcaj loĝlokoj kaj iĝis mondfamaj. La aliaj du, Ludoviko Győry Nagy kaj Ludoviko Király ĝis vivofino determinis Esperanto-movadon de la departemento Borŝod-Abauj-Zemplén kaj la departementrezidejo Miskolc.

La unuajn paŝojn *ĝis 1913* duope faris: Kolomano Kalocsay kaj Ludoviko Győry Nagy.

Pri la afero de esperantan lingvon lernantoj kaj komenco de la movado la rememoroj ne estas homogenaj. Laŭ iuj en 1911, laŭ aliaj en 1912 oni komencis lerni en Miskolc la esperantan lingvon, sed la unua organizita lernokurso okazis certe en 1913, ties aŭtentikan historion, kiel ĉefrolanto, D-ro Ludoviko Győry Nagy eternigis.

Kolomano Kalocsay jene rememoras pri sia konatiĝo kun la esperanta lingvo:

„Antaŭ pli ol sesdek jaroj mia amiko Ludoviko Győry Nagy kaj mi ekvidis iun esperantan lernolibron en montrofenestro de iu miŝkolca librovendejo… La libron ni aĉetis, ni lernadis en la somera ferio kaj plej bone tio surprizis min, ke ĝis Septembro ni jam ellernis”.

**Somere de 1912 - Jaro de la lingvolernado**

*En Aŭgusto de 1912* Ludoviko Győry Nagy kaj Kolomano Kalocsay en montrofenestro de Béni Ferenczi, miŝkolca librokomercisto ekvidis la esperantan lingvolibron.

Tiel ŝajnas, ne nur ili interesiĝis en Miskolc pri la esperanta lingvo, pri kio ankaŭ gazetanoncoj vokis la atenton. Jam en 1910 laŭ iu Miŝkolca gazetfamo „ankaŭ en nia urbo multe da homoj lernas la esperantan lingvon”.

Ludoviko Győry Nagy kaj Kolomano Kalocsay lernis ne nur el libroj, sed ili ankaŭ korespondadis kun eksterlandaj esperantistoj kaj abonis ankaŭ esperantajn gazetojn. Tiutempe Kalocsay skribis poemojn kaj hungare kaj esperante. Liaj kelkaj poemoj aperis ankaŭ en „Okcidento”. La du – nun jam entuziasmaj – esperantistoj, ĉefe Ludoviko Győry Nagy ne kontentiĝis per ĉi tio. Li tion pensis, ke nur tiel eblas utiligi, perfektigi ilian esperanto-scion, se somere de 1913 en Miskolc oni gvidus lernokurson kaj ties inaŭgura prelego petus tiaman prezidanton de la Hungara Esperanto-Asocio.

# Mallonga kroniko de dek jaroj
**/1913-1923/**

**/Miŝkolcaj famaj pioniroj de Esperanto/**

## Komenco de la movado – la unua propagand-prelego

Unua granda sukceso de Esperanto estis atingita en 1905 en la franclanda Boulogne-sur Mer Poste ĉiujare en aliaj ĉefurboj oni aranĝis Esperanto-kongreson kaj nature en 1912 la jubilean okan okaze de la 25-a datreveno de apero de la lingvo en Varsovio, kie tiu naskiĝis. Okaze de tiu ĉi oni eldonis bildkarton kun surskribo „eminentuloj" kaj fotoj de 13 esperantistoj inter kiuj estis du hungaroj. Unu el ili estis Aleksandro Giesswein, prezidanto de Hungara Esperanto-Societo. Lin petis Ludoviko Győry Nagy, por prelegi *la 13-an de Julio 1913*, kiun daton oni publikigis tre originalmaniere. Ludoviko Zsarnay, kiu pli malfrue aliĝis al ili /li estis du jarojn pli juna universitatano/, faris alvokon skribite sur afiŝo kaj apud ĝin starigis siajn du etajn kuzinojn, fotis ilin, kaj el la foto faris bildkartojn kiujn li dissendis.

Dum la menciita tago D-ro Aleksandro Giesswein alvenis al la Miŝkolca Tiszai-fervojstacio, kie, komisiate de la urbestro, je la nomo de la urbo akceptis lin ĉefnotario D-ro Aleksandro Hodobay .Dank' al la bona organizado, la solenejo de la urbodomo tute pleniĝis, la prelego estis sukcesa.

## La unua lernokurso – Foto pretiĝis pri tiu

Efike de la alvoko kvindek personoj anonciĝis, kiujn oni dividis en du grupojn. Iun gvidis Kolomano Kalocsay, la alian Ludoviko Győry Nagy. La kurso daŭris dum kvin semajnoj. Semajne du prelegoj okazis en la Deák-strata komerca mezlernejo. Fine de la kurso oni faris foton.

Inter la miŝkolcaj kursanoj estis ankaŭ Aleksandro Vándor, kies instruisto estis Kolomano Kalocsay. Pli malfrue inter ili kunliga kontakto estiĝis la poezioj de Attila József kaj Endre Ady.

Ekz. Aleksandro Vándor muzikigis „La lago ridis" titolan poemon de Endre Ady kaj tiun dediĉis al Kolomano Kalocsay, tradukanto de la poemo.

Rememoraĵo de Ludoviko Győry Nagy aludas tion, ke la kursgvidado de Kolomano Kalocsay por li fortigis la Esperanto-scion, la literaturan disvolviĝadon.

*La 25-an de Aŭgusto 1913* Ludoviko Győry Nagy festis lian 21. nomtagon. Okaze de tiu ĉi Kolomano Kalocsay skribis esperantlingvan salutantan poemon.

La sekvan, 1914.jaran kurson la unua mondmilito fiaskigis.

## Dum la unua mondmilito – laŭ lingvo de la paco

*En la jaro 1914-a* la eksplodinta mondmilito kaj la mobilizadoj haltigis organizan vivon de la movado. La 11-an mondkongreson, planitan en Parizo, en la jaro 1914 oni ne aranĝis. Ankaŭ Zamenhof nur ĉirkaŭvoje povis reiri en sian patrion. Dum la milito, la 1915. jara oktobra numero de la budapeŝta „La verda standardo" alvokis la atenton de la en militarmeon soldatiĝitaj hungaraj esperantistaj soldatoj, ke ankaŭ sur la batalkampo portu verdan stelon de la esperantistoj, ĉi tiel esprimu ilian militkontraŭecon.

Julio Baghy *de 1915* dum ses jaroj en la siberia militkaptitejo organizis esperantajn lingvokursojn inter liaj diverslingvaj samsortuloj.

Ludoviko Király *en 1916-17* en la fronto por liaj soldatkamaradoj organizis kurson kaj ankaŭ esperante konversaciis kun finndevenaj soldatoj dum paca tranĉeo-renkontiĝo.

Ankaŭ Kolomanon Kalocsay oni soldatigis por kuracista servado. Li portis tien esperantajn literaturajn librojn kaj maldeprine skribis, tradukis poemojn.

Ludovikon Győry Nagy oni soldatigis preskaŭ „fintage" de la milito. Li vundiĝis en 1918. Dum la Konsiliantara Respubliko en Miskolc li estis notario de la Respublika Trribunalo, pli frue ties akuzpolicano.

Pro tio pli poste kiel punon oni enoficigis lin al Mezőcsát kiel advokaton, al la jaroj 1920-25.

## „Harmonio" – la unua Esperanto-grupo en Miskolc

Samtempe, kiam en 1913 komenciĝis Esperanto-kurso en Miskolc, en Késmárk (nun: Kéšmarok) Ludoviko Király – instruisto de tiea mezlernejo – komencis kurson. Post la kurso li fondis grupon kun la nomo TÁTRA. Post la milito li ricevis postenon en Miskolc en la komerca mezlernejo. *De 1920* dum kvar jardekoj direktis daŭre la Miŝkolcan Esperanto-movadon.

Ludoviko Király ekkonis la Miŝkolcajn esperantistojn, inter ili dr-on Ludoviko Győry Nagy, kiu jam ekde 1913 estis delegito de UEA, same kiel li.

*Fine de 1921* fondiĝis la unua Miŝkolca grupo, kiu portis nomon Grupo „Harmonio" de Hungara Esperanto-Societo. Ties prezidanto estis Ludoviko Király. La grupo havis rondan stampilon, kiu ĝis nun konserviĝis. Anoj de la grupo renkontiĝis marde kaj vendrede de la 17a horo en la kafejo de la Hotelo Abbazia kaj dimanĉe inter la horoj 16-20. Sekretario de la grupo estis Mikelo Auer, advokato, du delegitoj de la grupo estis Stefano Győry Nagy kaj dr-ino Jolan Fodor Gózon, kuracisto.

Organizantoj de la grupo estis ankoraŭ Stefano Stuber, Ludoviko Szendy kaj Elizabeta Weinberger

**Landa kongreso en Miskolc - la unua post la milito**

*En Aŭgusto 1922* la Miŝkolca gazetaro skribis la jenon: „La Miŝkolca Esperanto-movado tiel fortiĝis, ke la loka grupo „Harmonio" kuraĝis entrepreni la aranĝadon de tutlanda Esperanto-kongreso". En la estraro de la ankaŭ laŭ eksteraĵoj impona kaj grandsukcesa kongreso prezidanto estis Ludoviko Király, vicprezidantoj d-ro Kolomano Kalocsay kaj d-ro Ludoviko Győry Nagy, ĉefsekretario Stefano Győry Nagy. Inter aliaj alparolis 18 reprezentantoj de hungaraj Esperanto-societoj, kaj Paŭlo Balkányi raportis pri la mondkongreso en Helsinki.

La oficiala gazeto de Hungara Esperanto-Societo detale konigis la programon, kaj raportis pri la okazintaĵoj. Artikoloj de Ludoviko Király kaj Johano Kozma faris bonan propagandon pri Miskolc.

La kongreso havis 214 oficialajn partoprenantojn, sed dum la arta vespero en la popolĝardena amuzejo ĉeestis 500 personoj. Grandan sukceson havis Julio Baghy, kiu estis aktiva partoprenanto de la tuta kongreso.

Valoraj memoraĵoj estas la esperantlingva, ilustrita verko de Ludoviko Király, kiu prezentas Miŝkolcon kaj ties ĉirkaŭaĵon kaj konigas la historiojn de Miŝkolca galantino kaj la 999 botistoj kaj ankaŭ epitafojn el la Avas-monta tombejo.

**Artikoloj pri Esperanto – Lingvoinstruado**

En Miskolc informis pri Esperanto ne nur la montrofenestroj de librovendejoj. La Miŝkolcaj gazetoj jam en 1910 propagandis per novaĵoj, poste Béni Ferenczi, librokomercisto aranĝis ankaŭ libroekspozicion el esperantaj eldonaĵoj. *En 1922* dum la semajno de la 4a landa kongreso ĉiutage estis Esperanto-kroniko en gazeto „Reggeli Hírlap" (Matena Ĵurnalo) inter la *23-26a de aŭgusto*. La science valoraj artikoloj de Ludoviko Király/König/ estis grandsignifaj.

Post la kongreso Ludoviko Király intensive faris la instruadon de la lingvo. De 1922 ĝis 1927 li gvidis multe da kursoj (por komencantoj kaj progresantoj). Lia eseo „Ĉu ni instruu Esperanton en mezlernejoj?" iĝis fama.

*En 1926-27* li gvidis tre vizitatajn kurson en du klasoj kun 250 partoprenantoj. Dume inter la jaroj 1923-27 li estis aktiva partoprenanto de kvar mondkongresoj.

Dum la entute 50 jara esperanto-agado de Ludoviko Király aperis de li pli ol 180 diversaj hungar- kaj esperantlingvaj artikoloj, eseoj en diversaj gazetoj. Inter la jaroj 1923-1961 li estis delegito de UEA. Ludoviko Kökény skribis en sia rememoro en februaro 1961, ke ankaŭ li dum porpedagoga kurso de Ludoviko Király ellernis la lingvon, kiam li loĝis en Miskolc kaj instruis tie en la komerca mezlernejo, poste dum 15 jaroj en la stenografia kaj tajpista faklernejo. En Miskolc li laboris ankaŭ kiel ĵurnalisto. Ĉi tiu eminenta, elstara literatura, gazetredaktista personeco de la hungara Esperanto-movado volonte vizitis dum longaj jardekoj al Miskolc ankaŭ kiel preleganto.

# Miŝkolcaj laboristaj esperantistoj

**(1924-1944)**

**De grupfondigo ĝis malpermeso**

## Societo de la laboristaj esperantistoj - Malpermesitaj ideoj

La unua Esperanto-grupo de Miskolc ne estis longviva. La cirkonstancoj estis tiaj, ke ĝi ĉesis fine de la 1920-aj jaroj (1927). Sed la urbo ne restis Esperanto-grupo. La flagon de la movado pluportis ekde 1925 tiuj, kiuj iĝis anoj de la Societo de Hungaraj Esperantistaj Laboristoj fondita en 1913. Ĉi tiu societo aŭdigis sian voĉon ankaŭ dum la unua mondmilito. *En 1924* fondiĝis en la lando 11 grupoj, ankoraŭ en 1925 pluaj ses, la 17a grupo estis tiu en Miŝkolc, kiu havis 30 anojn. La nombro de la grupoj de la laboristaj esperantistoj kreskis en 1929 ĝis 30 kun 1500 membroj. En la gazeto „Népszava" kaj sindikataj gazetoj ĉiam pli multaj artikoloj, informoj, propagandaĵoj aperis.

Oni konsideris ankaŭ la agadon de la Esperanto-societo en Miskolc kiel laboristan klerigadon en februraro 1925, kiam oni komencis la unuajn organizajn aktivadojn. *La 22-an de Aprilo* oni invitis la interesiĝantojn por fondiĝa kunsido. La komunaj kunvenoj okazis en legejo de la gazeto „Reggeli Hírlap". Jam en novembro oni aranĝis ekspozicion. Sed komence de 1926la urbestro ne aprobis la statuton de la societo.

La gazeto „Reggeli hírlap" amare konstatas: „Inter la Miŝkolca laboristaro ne estas permesite disvastigi la ideojn de Ludoviko Zamenhof."

## Malpermesita societo - 50 pengoj (pengő = malnova hungara mono)

Tutlande funkciis la Esperantista Societo de Hungarlandaj Laboristoj kadre de la Socialdemokrata Partio, sed en la 20-aj jaroj ĝi venis sub la influon la Hungarlanda Partio de Komunistoj. Jam de 1927 ne estis sendanĝera la partopreno en la movado, kiu estis malfaciligita pro la policistaj persekutadoj.

*En 1927* estis la rezidejo de la Miŝkolcaj laboristaj esperantistoj la Ferlaborista Kulturdomo „Vasas" kulturdomo sur la placo Deák. Ĉi tien oni sendigis la eksterlandajn kaj hungarajn revuojn. La l-an de aprilo 1927 oni malpermesis la revuojn „Sennaciulo" kaj „La lernanto." Ĉe kiu oni trovis malpermesitajn esperantlingvajn literaturaĵojn, tiun atendis aresto, hejma aresto, monpuno aŭ enkarcerigo. Tio okazis ankaŭ en Miskolc, ja ĉi tiuj gazetoj atingis ankaŭ Adalberton Lehóczky, kiu estis sekretario de Miŝkolca grupo de la societo. La polico konfiskis ĉiujn eldonaĵojn, librojn kaj li estis kondamnita dektaga malliberigo aŭ 50-penga monpuno.

Sed la Miŝkolcaj laboristaj esperantistoj ne ĉesigas la funkciadon malgrau tio, ke la policistĉefo ne rekonis la fondiĝon de la grupo. Ili aranĝis prelegojn, kiujn oni vizitis ankaŭ de aliloke. Oni aranghis deklamvespersojn kaj kursojn ĉe la konstrulaboristoj, ferlaboristoj, presistoj. Ili aktivis ankaŭ en Diósgyőr kaj Pereces. La kurson en la Kossuth-strata rezidejo la la polico ĉesigis. Oni devis peti permeson por aranĝaĵoj, kaj prezenti la liston de kursanoj al la polico.

*En 1928* fondiĝis la kulturasocio de la organizitaj laboristoj, inter kies membroj oni elektis plurajn esperantistajn reprezentantojn. Tiel oni mildigis la ŝarĝon de neleĝeco.

**Refondiĝoj - 23 laboristoj**

*Inter 1929-1931* ankaŭ tutlande malpliigis la movada aktiveco de laboristaj esperantistoj, sed post kvar jaroj en Miskolc ili denove organiziĝis. *La 13-an de Novembro 1932* oni aranĝis refondan kunvenon kun delegitoj de esperantistoj el Budapeŝto kaj Eger, sume 20 personoj. La kunsidon prezidis Adalberto Lehóczky. En ĉi tiu jaro ekzistis 33 grupoj. Rezidejo de la Miŝkolca grupo estis sub nr.2. str. Rákóczi. Sed la funkciadon de la grupo oni denove ĉesigis, ĉar *la 4-an de Januaro 1934* oni denuncis al la Miŝkolca polico, ke 14-an de januaro oni aranĝos ĝeneralan kunvenon en la konstrulaborista hejmo en strato Kun József.

Al la refonda kunveno venis Ladislao Berg el Budapeŝto kiel delegito. Lian prelegon aŭskultis 16 personoj kaj oni elektis estraron. 23 anoj de la Miŝkolca grupo havis membrolibrojn. Ĝi havis 20 virajn kaj 3 virinajn membrojn. Laŭprofesie ĉiuj estis laboristoj: 5 seruristoj, 3 tajloroj, 2 lignaĵistoj, 2 ŝoforoj kaj je 1 lokomotivestro, bindisto, tornisto, spicaĵisto, enkasigisto, masonisto, remburisto, verŝisto, frizisto.

**La ministro de internaj aferoj decidas - fino de la societo**

En la membrolibreto n-ro 6263 de Adalberto Lehoczky ne estas gluitaj markoj por la jaro 1934 kaj ankaŭ por la pluaj jaroj mankas membromarkoj. Kiam *la 14-an de Januaro 1934* refondiĝis la Miŝkolca Laborista Esperanto-Grupo, jam pretiĝis la raporto de la politika detektiva ĉefgrupo de la polico en Budapeŝto. La ampleksa skribaĵo taŭgus ankaŭ kiel Esperanta movadhistorio, kun aparta konsidero de la laborista Esperanto-movado. Surbaze de tiu ĉi raporto decidis la ministro de internaj aferoj en sia dekreto n-ro 177.338/1934.VIII de la *9-a de Aprilo 1934*, ke li malpermesos, disigos ĉiujn laboristajn Esperanto-grupojn – ankaŭ la Miŝkolcan –, kaj konfiskos ilian havaĵon.

Ĉi tiun dekreton anticipis la Hungara Socialdemokrata Partio la 14-an de februaro 1934, ĉar ĝi rifuzis ĉiun komunecon kun la Societo de Esperantistaj Laboristoj, kaj alvokis la laboristojn ĉesigi sian membrecon en la societo.

*La 22-an de Februaro* 1934 la Budapeŝta centro de la Societo de Esperantistaj Laboristoj sendis leteron al siaj grupoj. En ĉi tiu ĝi nomis kalumnio la decidon de la 13 de Februraro de la partio, laŭ ankaŭ la estraranoj estas eksigitaj. Tiam okupis 25 detektivoj la Dob-stratan centron de Laborista Esperanto-Societo, kaja arestis ankaŭ la personojn nomitajn en la gazeto „Népszava”. Ĉar oni ne trovis kulpigajn pruvojn, ili estis liberigitaj.

**La malpermesado de la societo kaj la grupoj estis granda perdo por la lando kaj al la Esperanto-movado de Miskolc. Ĉi lasta reviviĝis nur post 1945.**

# Reviviĝantaj Esperanto-grupoj

**/1945-1956/**

**En Hejőcsaba, Miskolc, Diósgyőr**

## Membrokotizo 500 „pengő" – Unuiĝita Societo

En la sudorienta landparto jam en 1944 – post ĉeso de la bataloj – en Orosháza oni aranĝis Esperanto-konferencon. Post liberiĝo de Budapeŝto en 1945 kaj la Hungara Landa Esperanto-Societo kaj la Societo de Hungarlandaj Esperantistaj Laboristoj ekkomencis siajn funkciadojn. Plej grava farendo estis en la lerneja instruado la enkonduko de Esperanto. En 1946 komenciĝis ankaŭ esperantlingva dissendo de la Hungara radio.

Ankaŭ en Miskolc malrapide normaliĝis la situacio por reviviĝo de la Esperanto-grupoj. Adalberto Lehóczky denove ricevis fine de januaro 1946 novan membrolibron de Societo de Hungarlandaj Esperantistaj Laboristoj, kies vicmontra numero estis:177. Li komencis sian agadon en Hejőcsaba. Adalberto Lehóczky jam la 14-an de Januaro 1946 skribis leteron al centro de Laborista Esperantista Societo, de ĝi li petis 5 novajn membrolibrojn por reorganizado de la grupo./ La membrokotizo estis 500 „pengő"./ Unupaĝan respondleteron de la societo – datite 20-an de Januaro 1946 – Adalberto Lehóczky gardis. Oni aranĝis en Orosháza en 1946 Esperanto-kongreson kaj en 1947 en Pécs, kie decidis unuiĝon de la du hungarlandaj societoj kiuj kune kun plufunkciis.

En intereso de tiu ĉi celo oni kunvokis konferencon de la Miŝkolcaj esperantistoj *la 22-an de Julio 1947*, dum kiu Ludoviko Király prezidis. Ankaŭ Adalberto Lehóczky ĉeestis. Laŭ rezolucio ili petis la landan societon por fondi lokan Esperanto-grupon.

Laŭ la centra esperantlingva gazeto la konferencon kaj grupofondon ili planis okaze de 60. jara datreveno de naskiĝo de la lingvo /13 de Julio 1887/. La loka grupo elektis estraron, , en kiu prezidanto estas Ludoviko Király, vicprezidanto: Johano Kozma, sekretario: Adalberto Lehóczky, kasisto: Márta Váry, notario: Antono Répássy, advokato: D-ro Ludoviko Győry Nagy.

## Lernokursoj, instruado – Pli nova paŭzo

Okazis iniciato al renovigoj de du Esperanto-societoj kaj Adalberto Lehóczky ricevis de 1948 novan membrolibron, kies vicmontra numero estas 503. Li petis *la 14-an de de Januaro 1948* en letero de la B.A.Z. departementan lernejan inspektiston, ke la bazlernejo de Hejőcsaba certigu iun lernoĉambron por Esperanto-lernokurso. Li ricevis la permeson.

Kiam en 1946 iu ministra dekreto permesis en la komercaj lernejoj instruadon de Esperanto, tiam Ludoviko Király en la miŝkolca komerca mezlernejo pritaksis la interesiĝantojn, ilia nombro estis 65. La dekreto permesis nur 20, pli malfrue 25 gelernantojn. La lernokurso daŭris de *15 Decembro 1946 ĝis fino de Majo 1947* kaj Magda Nagy prelegis tre ege sukcese en la Studento-parlamento.

*La 22-an de Julio 1947* dum la Miŝkolca konferenco oni decidis organizadon de pluraj komencaj kaj progresaj lernokursoj, kiuj en la lernojaro 1946/1947. konatigis Esperanton al multaj Miŝkolcanoj. Ĉi tiu kontribuis al evoluo de la urbo. La lernokurson Ludoviko Király gvidis.

Post la grupounuiĝo la movado povis evolui nur malintensive. Pro la rekonstruadaj laboroj oni ĉesigis la movadajn laborojn. Laŭ aliaj fontoj en la societo estis karakteriza dum jaroj de la personkulto la malkonfido. Stefano Temesi, miŝkolca fervojista esperantisto, kiu en 1946-47 ellernis la lingvon, ankaŭ dum la paŭzo havis kontakton kun budapeŝtaj esperantistoj kaj ĉi tiel informiĝis pri la okazintaĵoj.

**Komenciĝas en Miskolc - Lernokurso kaj grupo**

Laŭ la Esperanto-historiaj fontoj la landa esperanto-movado denove komenciĝis *en 1955-56.* Sed en Miskolc la fervojisto Stefano Temesi organizis Esperanto-lernokurson jam printempe en 1954, samtempe li komencis redakti la „Verda vojo" titolajn ĵetpaĝojn kaj samnome fondis grupon ĉe la Veturil-ripareja entrepreno de Hungaraj Ŝtatfervojoj

Ankaŭ Adalberto Lehóczky, estro de miŝkolca grupo de la Laborista Esperantista Societo ne atendis la centran direktadon. Li skribis unu paĝan peticion al Uzina Komitato de Metalurgia Kombinumo „Lenin" por permesi komencadon de ok-persona lernokurso. Li aludis al stockholma alvoko de la Tutmonda Packonsilantaro kaj en revuo „Szabad Nép"/Libera popolo/ /*24 Februaro 1955*/ aperigita artikolo pri apogado de favoraĵoj. Prezidanto de uzina komitato tiun konfirmis. Iniciatado de Stefano Temesi kaj Adalberto Lehóczky estis pionira en la fervojaj kaj metalurgiaj uzinoj, ja ankaŭ en Budapeŝto nur *la 4-an de Aŭgusto 1955* fondiĝis la unua Esperanto –grupo en la placo Engels kaj unue la *17-18-an de Septembro* oni aranĝis Esperanto-Pac-renkontiĝon. Tiutempe fondiĝis la tn. Landa Esperanto-Konsildona Komitato.

**Grupo en Diósgyőr - Forrestinta renkontiĝo**

Post la sukcesa lernokurso en 1955, fondiĝis grupo ĉe la Metalurgia Kombinumo „Lenin". Ĉi tiu grupo ricevis leteron *la 13-an de Novembro1955*:

„Karaj gesamideanoj! Dua plena kunsido de la Landa Esperanto Konsildona Komitato sendas sian varmegan samideanansaluton. Ni deziras, ke akceliĝado de la Hungara Esperanto-Movado estu daŭra kaj sukcesoj, elstaraj rezultoj helpu viajn laborojn…”

Adalberto Lehóczky *la 2-an de Septembro 1955* lanĉis novan lernokurson en la Metalurgia Kombinumo „Lenin”, al kies Esperanto-fakronda adreso alvenas la leteroj, gazetoj. Ankaŭ la 3-a plena kunsido de la Landa Esperanto-Konsildona Komitato salutis la Esperanto-fakrondon de Metalurgiaj Kombinumoj „Lenin”. La komitato instigis Stefanon Temesi, Paŭlon Balkányi kaj Adalberton Lehóczky por aranĝi teritorian Esperanto-Renkontiĝon. En jaro 1956 la anoj de lernokurso kaj fakrondo en laVeturilriparejentrepreno de Hungaraj Ŝtatfervojoj komencas viglan korespondadon, en la uzina gazeto propagandas, en la Kulturdomo de Hungaraj Ŝtatfervojoj aranĝas pacletervesperon kun gastoj el Ózd, Sárospatak, Diósgyőr, Hejőcsaba. La pacletervesperon gvidis Francisko Czakó. Stefano temesi raportas pri siaj bulgariaj kongresaj travivaĵoj, poste oni planas la 27-28-an de Oktobro 1956 Nordhungarian Esperanto-Renkontiĝon, apogante de la Landa Esperanto-Konsilantaro. Sed tiu ĉi ne okazis pro la oktobraj okazintaĵoj.

**La „Verda vojo” en Miskolc - en la lando estas la unika**

La Esperanto–Fakrondo en la Kulturdomo „Erkel Ferenc” de Hungaraj Ŝtatfervojoj eldonadas *en 1956* Esperanto-informilon „Verda vojo”, redaktitan de Stefano Temesi, je servado de la paco kaj kulturlaboro. La ĉefartikolojn skribis Paŭlo Balkányi. La multobligita gazeto okupiĝis pri okazintaĵoj de Esperanto kaj paco de la lando kaj eksterlando. Ĝi komunikis skribaĵojn de landaj raportistoj.

*En 1956*. oni organizas lernokurson kaj fondas fakrondon ankaŭ en la maŝinfabriko DIMÁVAG, ties sekretario estas Nikolao Matula. Lernokurso komenciĝas ankaŭ en miŝkolca sindikata rezidejo /nr.11. str.Kossuth/.

En Miskolc oni akceptas ankaŭ la esperantan propagandon. Vilhelmo Radnay metas bildkartojn en du ĉefstrataj montrofenestrojn, ĉe la presejo ankaŭ librojn.

*De Januaro 1957* la „Verda vojo” aperis litografe, redaktite de Stefano Temesi kaj de Stefano Pál. Ĉefkunlaborantoj estis Paŭlo Balkányi kaj Johano Kozma. La eldonkvanto komence estis 400, poste 500 ekzempleroj. Laŭ la statistiko ĉi tiu estis tiutempe la nura Esperanto-gazeto en Hungario.

## Pri Nordhungariaj Esperanto-Renkontiĝoj

### 1957-1961

### Esperanto-placo, Esperanto-fonto, Zamenhof-strato

### Renkontiĝo en Miskolc - Esperanto-placo

La plej signifa okazintaĵo *de jaro 1957* estas la 1-a Nordhungaria Esperanto-Renkontiĝo en Miskolc, la 13-14-an de Julio. Antaŭ tiu *en Majo 1957* fondiĝis en nr.11.str.Kossuth denove Esperanto-grupo kaj aranĝkomitato. Kvankam du semajnojn antaŭ tiu en Szeged estis la Sudhungarlanda Renkontiĝo kaj en la lando epidemiis, tamen ĉeestis 150 partoprenantoj. Julia numero de „Verda vojo" pleniĝis per Miŝkolcaj interesaĵoj, ĉefe skribite Ludoviko Király. En la aŭgusta numero sekviĝas detala raporto de Stefano Temesi.

Laŭ la programo Ludoviko Király inaŭguris la placon Esperanto, li prezidis dum la kunsido, kie Julio Baghy, prezidanto de Hungara Esperanto-Konsilantaro diris la festan parolon. Alparolis Ludoviko Márton ĉefsekretario de la Landa Esperanto-Konsilantaro kaj Paŭlo Balkányi nome de la Esperanto-pacorganizaĵo. Fakkunsidon de la fervojistoj gvidis Stefano Bácskay. La belegan ekspozicion aranĝis Vilhelmo Radnay. La renkontiĝon partoprenis Tódor Kovács, la tiam vivanta plej malnova hungara esperantisto. Pri la renkontiĝo donis sciigon la Miŝkolca Radio kaj revuo Északmagyarország /Nordhungario/. Reputacion de la renkontiĝo pliigis tio, ke en revuo Északmagyarország artikoloj de Ludoviko Király aperis pri historio kaj literaturo de la esperanto-lingvo. La landa renkontiĝo havis ankaŭ organizantan forton, ĉar grandnombra lernokurso komenciĝis denove en la „Erkel Ferenc" Kulturdomo /Ludoviko Király gvidis tiun kaj havis 32 personojn./ kaj fondiĝis la dua Fervojista Esperanto-Fakrondo en Miŝkolca Direkcio de Hungaraj Ŝtatfervojoj la 21-an de Decembro 1957.

Krom la Urba Komitato de Patrota Popolfronto kaj Packomitato de la urbo fondiĝis ankaŭ la Esperanto-Packomitato, kies gvidadon oni komisiis al D-ro Ludoviko Győry Nagy.

### Renkontiĝo en Eger – Kongreso en Varsovio

Post la unua nordhungaria sukcesa esperanto-renkontiĝo *en 1958-60* atingis unu la alian la okazintaĵoj. Dum ĉi tiuj tri jaroj du nordhungariaj renkontiĝoj kaj en Varsovio la jubilea 44-a mondkongreso kreskigis rangon de Esperanto- movado. Ne nur en Miskolc, sed ankaŭ en B.A.Z. departemento vigliĝas la organiza vivo kadre de la lermokursoj kaj fakrondoj.

*La jaro 1958-a* komenciĝis malgaje. *La 3-an de Januaro* mortis Johano Kozma, kiu esperantiĝis en 1911, ano de Miŝkolca grupo, kunlaboranto de la „Verda vojo".

*En Marto* oni inaŭguras memstaran Esperanto-ĉambron en la fervojista kulturdomo, la urba fakrondo iniciatas kolektadon al kostoj de la Esperanto-placa memortabulo.

*De Septembro* la urba fakrondo eldonas multobligitan informilon „Miŝkolca Esperantisto”. Oni eldonas Esperanto-gramatikon de Ludoviko Király.

La estraro estis en 1958: Prezidanto: Ludoviko Király, sekretario Ludoviko Solticzky, kasisto: Márta Váry. *La 4-5-an de Oktobro 1958* en Eger oni aranĝis la 2-an Nordhungarian Renkontiĝon, dum kiu anoj de la tri miŝkolcaj grupoj partoprenis kaj faris ekzamenon. La ekzamenanto estis Julio Baghy. *En 1959* okazis reelektado de la estraro. Ĉe la sindikata urba grupo estis prezidanto Ludoviko Király,, organizanta sekretario: Stefano Pál, sekretario: d-ro Menyhért Ádám, ekonomia respondeculino: Márta Váry. Ĉe la fervojista grupo „Verda vojo” estis prezidanto Stefano Temesi, sekretario: Francisko Czakó, kasisto Julio Árvay.

En Edelény kaj Sajóbábony delegito de la miŝkolca grupo: Stefano Pál. Li gvidas lernokurson kaj prelegis pri Esperanto en la miŝkolca markkolektanta fakrondo. La „Verda vojo”, redaktite de Stefano Temesi aperas sisteme. Ĉe la fervojista fako funkcias 16 fervojistaj Esperanto-grupoj, el inter du grupoj en Miskolc.

*La 15-an de Decembro 1959* sur placo-Esperanto oni inaŭguris la novan marmortabulon. Dum tiu Ludoviko Solticzky diris la memorfestan parolon.

**La 3. renkontiĝo -- strato Zamenhof kaj fonto-Esperanto**

*Jam komence de 1960* informilo kaj programo aperas pri aranĝado de la 3. Nordhungaria Miŝkolca Esperanto-Renkontiĝo. La fervojistaj kaj sindikataj urbaj esperantistoj prepariĝadas intensive.Ludoviko Solticzky - kiu estas referanto de financaj aferoj de la Urba Konsilio - agadas pri nomiĝo de strato Zamenhof kaj la fervojistoj iun fonton dezirus nomigi pri Esperanto. Ambaŭ sukcesas kaj *la 14-15-an de Marto* al Miskolc vizitanta grandnombra esperanto-societo havis travivaĵvriĉajn tagojn.

Dum la du tagoj Julio Baghy ekzamenis A,- kaj B-ekzamenantojn. La festa kunsido estis denove en solenejo de la Urba Konsilio, kie D-ro Ludoviko Győry Nagy prezidis. Dum la dua tago ĉe strato Zamenhof Ludoviko Kökény festparolis, posttagmeze en Lillafüred Ludoviko Király inaŭguras la fonton-Esperanto. Interesaĵo de la programo estas, ke la ĉeestantoj ekiris de la miŝkolca Esperanto-placo al Lillafüred per la Malgranda Arbara Vagonaro kaj de tie perpiedis al la sur bordo de lago Hámori estanta Esperanto-fonto. La renkontiĝon salutis telegrafe la moskvaj esperantistoj kaj Marjorie Boulton, verkistino el Anglio, kiu riĉigis la ekspozicion de valoraj aĵoj.

*La 15-an de Majo 1960* festas Ludoviko Király en Kossuth-strata rezidejo 50 jaran jubileon, kie ĉeestis liaj estimantoj, disĉiploj, konatuloj kaj lia familio. Li skribis -- bedaŭrinde nur kelkpaĝan -- rememoron okaze de tiu ĉi, kiu estas valora fonta materialo.

*En 1960* la sindikata Esperanto-grupo elektis novan estraron. En tiu organiza sekretario estis Stefano Pál, prezidanto estis Ludoviko Solticzky, honora prezidanto estis Ludoviko Király, kasistino estis Márta Vári kaj bibliotekistino estis Angéla Petőfi.

**Malgaja jarkomenco -- Departementa Komitato**

*Jaro 1961* komenciĝis per funebro de la miŝkolcaj esperantistoj. La 10-an de Januaro mortis Ludoviko Király, post lia 50. jaraĝa jubileo. La fakrondo, kies honora prezidanto estis, eldonis esperantlingvan funebran anoncon, dum la entombigo Ludoviko Solticzky diris esperantlingvan funebran parolon. En Informilo de la Sindikata Esperanto-Fakrondo aperis nekrologo pri Esperanto verkaro de Ludoviko Király. Lian mortofamon liaj disĉiploj konsterniĝante akceptis kaj per poemoj, leteroj rememoris lian verkaron.

*En 1961* signifa okazintaĵo estis la fondiĝo de la BAZ-departementa Teritoria Esperanto-Komitato, kiu eldonis tri cirkulerojn por karakterizi la okazintaĵojn. Solticzky estis sistema kunlaboranto de la „Hungara Esperantisto", de gazeto de HEA. En tiu ĉi inter aliaj komunikas tiun Kalocsay- memorvesperon, kiun oni aranĝis *la 26-an de Oktobro 1961*.Tiun D-ro Ludoviko Győry Nagy prezidis, Ludoviko Kökény parolis pri vivo de Kolomano Kalocsay kaj mem Kalocsay, la mondfama verkisto prelegis sub titolo „ Esperanto kaj la literaturo."

*La 8-an de Majo 1961* fondiĝas en Diósgyőr la „Szinva-vala Esperanto-grupo, gvidita de Jozefo Lőrinczi. (Tiu ĉi estis jam la kvara grupo en Miskolc.)

*La 3-15-an de julio 1961* Julio Baghy faris grandsukcesan lernokurson por pedagogoj en la „Földes Ferenc" gimnazio, kiun partoprenis 64 partoprenantoj.

## Esperanto-Instruado de Pedagogoj
**1962-1968**

### 1963. Julio Baghy en Miskolc.
### Marmortabulo en la grotode Aggtelek -- La unua lernejo

*De Februaro 1962* D-ro Ludoviko Győry Nagy denove gvidas du Esperanto-lingvokursojn. En la Miŝkolc rezideja Departementa Juĝejo kaj en la Urbdomo okazis la lernokursoj, el inter ties partoprenantoj tri personoj aliĝis al la Miŝkolca Centra Esperanto-klubo: D-ro Francisko Gárdus, D-ro Ladislao Székely kiel juĝistoj kaj fraŭlino Adrienne Földi oficistino de la Departamenta Sociala Asekuradejo.

*En Majo de 1963,* Julio Baghy prelegas, en Junio oni inaŭguras marmor-memortabulon en Aggtelek, en la gutŝtongroto. En Julio Ludoviko Solticzky kaj la sindikata grupo florkronas en Miskolc la Esperanto-placan memortabulon.

En Mezőkövesd kaj en Kazincbarcika daŭriĝas la Eo-vivo, kie Stefano Pál komencis unue por instrui Esperanton. Ministerio pri Klerigaj Aferoj permesis - *de 1963* en la mezlernejoj kiel fakultatan studobjekton, en bazlernejoj kiel lernokurson - instruadon de Esperanto. En gazeto „Köznevelés" ( Publikedukado) aperas iu entuziasmiga artikolo por la pedagogoj, somere de 1964, kiu entuziasmigas la pedagogojn por instrui Esperanton.

Saĝan antaŭvidon de D-ro Ludoviko Győry Nagy laŭdas, - kiu estas prezidanto de BAZ-departementa TEK -- ke antaŭ apero de la dekreto prizorgigis la lingvan-instruadon de pedagogoj.

*En 1964* pro malsano de Julio Baghy D-ro Ludoviko Győry Nagy petis D-on Franciskon Jáky por antaŭprepari la aŭskultantojn al la bazgrada ekzameno. Post finlegado de „Verda vojo", etromano de Julio Baghy, sekviis la ekzameno. *La 27-an de Aŭgusto 1964* inter la sukcese bazgrade ekzamenantoj estis la instruistinoj Maria Busai, s-ino Karlo Olajos, Julio Bossányi direktoro de Bazlernejo de Miskolc-apuda vilaĝo Szirmabesenyő kaj fraŭlino Adrienne Földi.

*La 1-an de Oktobro 1964* en Szirmabesenyő en la bazlernejo komenciĝis en la 3.-4. klasoj la Esperanto-lingvoinstruado kun Julio Bossányi, direktoro, Maria Busai kaj sr-ino Károly Olajos, pedagogoj. Ĉi tiun laboron la Miŝkolcaj esperantistoj de la ekiro helpis. En Kolegio „Petőfi" daŭriĝas la instruado de Esperanto jam kvin jarojn. (La lernokurson Ludoviko Király komencis en 1960, poste daŭrigis Stefano Pál kaj Stefano Temeŝi.) La Eo-grupo de DKS (=Departamenta Kulturdomo de Sindikatoj) havis 37 anojn kaj riĉan programon. Ili aranĝas ekspozicion kaj projekcias filmojn.

**Nova Esperanto-grupo en Diósgyőr.- Junulara grupo en la „Földes Ferenc" gimnazio**

En bazlernejo de Szirmabesenyő jam 80 gelernantoj lernas Esperanton, kiujn ankaŭ Julio Baghy vizitas en akompano de la miŝkolcanoj. En Kazincbarcika 40 partoprenantoj renkontiĝas kun 10 polaj esperantistoj kaj kun esperantistoj de 8 urboj kaj setlejoj.

En Diósgyőr en la nova „Ady Endre" kulturdomo *de la 1-a de Marto 1965* Jozefo Balázs, direktoro permesis al Stefano Pál, ke organizu lernokurson kaj fondu fakrondon, kiujn li gvidis ĝis 1975. Tiu fakrondo havas 20 anojn. Anoj de la grupo estas veteranaj laboristaj esperantistoj. Ili elektas Adalberton Lehóczky kiel honoran membron.

En la „Földes Ferenc" gimnazio la miŝkolca Pedagoga Esperanto-Fakgrupo fondas junularan sekcion la 21-an de Oktobro 1965. Ĝi havas gimnazianojn kaj memstaran estraron.

*La 17-an de Junio 1965* en teatrejo de sindikata rezidejo okazis memstara esperanto-vespero de pioniroj de Szirmabesenyő, kie 200 personoj aplaŭdis entuziasme, esprimante ilian plaĉon. Tie ĉeestis ankaŭ Julio Baghy, honora prezidanto de HEA. La sekvontan tagon estis literatura vespero de Julio Baghy, kie oni eternigas sur sonbendo liajn eternajn valorajn prelegojn, poemojn. La departemento kaj Miskolc kontentige donas informigon pri tiu, ke - krom la pedagoga kaj la du fervojistaj grupoj - havas ses Esperanto-grupojn, kaj dum dek lernokursoj oni lernas Esperanton. En urbo Szerencs en la gimnazio „Bocskay" unue estas Esperanto-klasifikaĵoj en atestiloj de 35 gelernantoj.

**Mondkongreso en Budapeŝto - Per ekstra trajno kaj per ekstraj aŭtobusoj al Aggtelek**

*En1966*, la Miŝkolcaj kaj departementaj grupoj havis riĉan programon. En Kazincbarcika oni nomumas Esperanto-promenejon. Ankaŭ la szirmabesenyőanoj prezentiĝis en Budapeŝto dum la mondkongreso, kie el 10 landoj 100 infanoj donis programon. La miŝkolcaj grupoj inter la *30-a de Julio* kaj *la sesa de Aŭgusto1966* aranĝas prelegojn, poste lernokursojn..Adrienne Földi havis helpan rolon dum la 52. UK, dum ekskurso de Budapeŝto al Aggtelek, al la gutŝtongroto de Aggtelek. En Miskolc organiza komitato formiĝis. La 220 personan multnacian esperantistan grupon 4 grupestroj akompanis: Adrienne Földi, Márta Váry, Stefano Pál, kaj Stefano Temesi. Dumvoje ili konigis vidindaĵojn de la regionoj kaj komunikis la de ili esperantigitan hungarlingvan tekston laŭ la pli frue ricevita fakmaterialo pri la grotaj vidindaĵoj. Ĉi tiun ekskurson organizis D-ro Ludoviko Győry Nagy kaj Stefano Temesi.

*En 1967* estas 10 jara la Esperanto-fakrondo de „Rónai Sándor" departementa kulturdomo. La klubokupiĝojn vizitas reciproke la miŝkolcanoj, szerencsanoj, kazincbarcikaanoj, mezőkövesdanoj. Denove okazas malgaja okazintaĵo. La 18-an de Marto 1967 mortis Julio Baghy, mondfama esperantista verkisto kaj poeto. Dum lia entombigo ankaŭ la miŝkolcanoj ĉeestis. Stefano Pál partoprenas en la Federacia Respubliko-Germanio / FRG / en Fulda dum Fervojista Mondkongreso kaj en Hamburgo dum la Landa Eo Kongreso kiel delegito de la fervojista Esperanto-fako.

**Miŝkolca informilo de fervojistoj - Veteranaj esperantistoj**

Pli nova sukceso de la Miŝkolca Pedagoga Esperanto-instruado estas, ke en bazlernejo de Nyékládháza instruas s-rino Géza Kóródy. En 1968 jam kun 85 gelernantoj konigas Esperanton kaj ne delonge ili prezentas memstaran programon.

En la sindikata kulturdomo anoj de la Esperanto-grupo rememoras pri la Internacia Virintago kaj ankaŭ foton aperigas iu enlanda kaj eksterlanda gazeto. La „Hungara Fervojista Mondo" eldonis *en 1968* Miŝkolcan aldonaĵon. En ĉi tiu aperas skribaĵoj kaj tradukaĵoj de Georgo Habel, Márta Váry, Angela Petőfi kaj Stefano Pál. Pri Tiszai-stacidomo, pri Lillafüred-a arbara vagonaro, pri fervoja ponto de Hejőcsaba kaj pri personoj de Kolomano Kando kaj Julio Baghy.

Daŭriĝadas la grandnombraj lernokursoj kaj ekzamenadoj. Kreskiĝas nombroj de Esperanto-grupoj. *La 29-30-an de Junio 1968* dum amika programa renkontiĝo oni salutas Adalberton Lehóczky kaj Ludovikon Solticzky, veteranajn esperantistojn honorigante ilian 50-jaran Esperanto-verkaron. Ambaŭ du estas anoj de la movado. Adalberto Lehóczky havas meritojn por miŝkolca funkciado de la Laborista Esperanto- societa vivo kaj Ludoviko Solticzky havis meritojn pro tio, ke li sukcesis atingi prinomadojn de la placo Esperanto kaj strato Zamenhof.

## Renkontiĝo en la Esperanto-parko

**1969-1976**

**„Ni estu dankemaj, ke Kalocsay vivis."**

**Fervojista renkontiĝo - Esperanto-parko**

La Miŝkolcaj esperantistoj havas pli novan Esperanto-grupon. En la Vörösmarty- kulturdomo /Miskolc, str. Lenke/fondiĝis nova fervojista grupo. La departementa komitato anoncas grandiozan lernokurson kaj konsultadojn por antaŭprepari al „A" kaj „B" ekzamenoj. Sukcese faris Bo-ekzamenon Maria Busai, instruistino de Szirmabesenyő.

Estraro de la klubo ankaŭ aparte salutas ŝin. La *10-an de Majo 1969* oni aranĝas departementan studadan konkurson en gimnazio „Földes Ferenc". Ĝiaj unuaj ses personoj akiris kvar premiojn dum landa konkurso.

*En Julio 1969*, fraŭlino Adrienne Földi faris prelegon montranta bildkartojn, prospektojn pri ŝia junia vizito ĉe Nederlandanoj (Leendert van Duijn, Jaap Katoen, Gerard Roelofs) kaj ĉe la aŭstria esperantisto D-ro Adolf Halbedl.

La plej granda okazintaĵo *estis en 1969*, la Landa Esperanto-Renkontiĝo en Miskolc dum la Landa Fervojista Tago, kies motivoj estis la 60. jubileo de la Fervojista Esperanto-movado kaj la 3 Miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-fakgrupoj.

Dum la dutaga renkontiĝo estis festa kunsido, inaŭguro de Esperanto-parko en Miskolc-Tapolca, ekskursoj al Aggtelek kaj Lillafüred, ekspozicio, kiujn partoprenis ankaŭ geesperantistoj de urbo Eger.

La departementa Esperanto-Komitato petis de 2. distrikta konsilio de la urbo en Miskolc-Tapolca stratnomigon pri Julio Baghy, sed tion oni nur promesis realigi pli poste. Sed la antaŭan peticion pri Esperanto-parko oni akceptis kaj tiel en Miskolc estas nun 4 memorlokoj pri Esperanto. La Esperanto-parkon D-ro Ludoviko Győry Nagy inaŭguris en Miskolc-Tapolca. La landan renkontiĝon sukcesigis subteno de 3 miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-grupoj kaj la B.A.Z. Departementa Teritoria Esperanto Komitato.

### Eksterlandaj gastoj - verkisto Mikelo Gergely

Gasto de la Miŝkolca renkontiĝo estis el Nederlando K.Gd.Jong, eksprezidanto de Fervojista Esperanto-Mondasocio kaj Hugo Kraus, vicprezidanto de Aŭstra Esperanto Asocio, kiu fotis

lokojn por la viena ekspozicio. Fraŭlino Adrienne Földi reprezentis por ili urbon Miskolc, kaj ties ĉirkaŭaĵon. Marta Váry gastigis samideanon Hugo Kraus. Jong sinjoro estis gasto de Ludoviko Győry Nagy. La du samideanoj faris prelegojn kun lumbildprojekciado pri belaĵoj kaj de Nederlando kaj Aŭstrio kaj ties Esperanta-vivo. Estis sukcesa la Esperanto-programo de pioniroj de Nyékládháza. Bulgaraj kaj la hungaraj pioniroj donis komunan Esperanto-programon.

En Miskolc *la 1-3-an de Majo 1970*, la 17 membra Esperanto-delegitaro de Pécs faris laborvizitadon. Dum tiu ili konatiĝis kun la instruadaj metodoj, rigardis esperantan kulturprogramon de lernejanoj de Szirmabesenyő kaj Esperanto-memorlokojn de Miskolc.

La *31-an de Majo 1970* inter grandnombraj bazgradaj lingvoekzamenantoj estis Ladislao Pásztor kaj inter mezgradaj lingvoekzamenantoj estis ankaŭ Adrienne Földi. La sukcesajn ekzamenantojn D-ro Ludoviko Győry nagy salutis dum la klubkunveno post la lingvoekzameno.

*En Decembro 1970* gasto de Zamenhof-vespero estis la en Varbo naskiĝinta Mikelo Gergely, budapeŝta verkisto kaj publicisto, ano de estraro de HEA, ĉefredaktisto de revuo „Hungara Vivo” kaj prelegis pri nuntempaj problemoj de la „Babela” multlingveco.

## Sukcesaj programoj - ekzamenoj, klubvivo

Prelegoj, raportoj, lernokursoj, ekzamenoj, okazis laŭsisteme en la fakrondoj. La Teritoria Komitato senĉese funkciis. La instruadon de plenkreskuloj kaj la lernejan instruadon oni devas plilarĝigi, ĉar ĉiam pli instruantoj faras instruadon de Esperanto. Kadre de la amikeca semajno 50 pioniroj de Szirmabesenyő 30 kantojn, poemojn de 17 landoj prezentas grandsukcese. Stefano Pál gvidas lernokurson ankaŭ en Vámosgyörk, kie la lingvo-ekzamenon el lingvo Esperanto ankaŭ D-ro Ludoviko Győry Nagy vizitas. *En Julio 1971* Adrienne Földi faris amikan vizitadon en Beográd, kie ŝi estis gastino de Antoni Sekelj, kiun ŝi konis ekde la 52 UK. Pri la vizitado kaj pri invito de Antoni Sekelj al Miskolc Adrienne Földi raportis al D-ro Ludoviko Győry Nagy.

*En 1972* en Miskolc denove oni aranĝas A,-B,-C-ekzamenojn. Maria Busai faris C-ekzamenon per elstara rezulto. Estraro de la klubo ne forgesas pri pli nova propagando. En aŭgusto kaj en septembro en la miŝkolcaj tramoj kaj aŭtobusoj estas videblaj alvokoj je la lernokursoj. *La 7-an de Majo 1972* multe da samideanoj faris sukcese lingvoekzamenon antaŭ ekzamenkomitato de HEA. Ankaŭ Adrienne Földi akiris Co-diplomon.

*Somere de 1972* dum la Esperanto-Somera Universitato en Gyula partoprenis D-ro Ludoviko Győry Nagy kaj fraŭlino Adrienne Földi. Pri tiu Adrienne Földi raportis poste.

*En 1972* oni aranĝis Departementan kaj Landan Junularan Renkontiĝon en Miskolc. Esperanto-fakrondo de „Rónai Sándor” Kulturcentro festis *en Aŭgusto 1972*. 80. naskiĝtagon kaj 60. esperantistan laboreman jaron de D-ro Ludoviko Győry Nagy, kiu partoprenis en

Usono dum 3 semajna rondvojaĝo je invito de kaliforniaj esperantistoj; pli frue gastigitaj en Miskolc pere de sinjoro Mikelo Farkas fraŭlino Adrienne Földi kaj de D-ro Ludovikoi Győry Nagy.

En 1972 gasto de la fakrondo estis Ludoviko Kökény.

**Pedagoga renkontiĝo - Sukcesoj de miŝkolcaj lernejanoj**

*La 20-an de Februaro 1973* Adrienne Földi faris sukcesan supergradan ŝtatan lingvo-ekzamenon el lingvo Esperanto en la „Eötvös Lóránd" Scienca Universitato en Budapeŝto, pri kiu D-ro Ludoviko Győry Nagy raportis al membraro de la klubo. En aprilo 1973 oni aranĝis en Miskolc Landan Renkontiĝon de la Esperantistaj Pedagogoj. Oni aranĝis demonstraciajn horojn pri lerneja instruado de lingvo Esperanto.

En Gyula dum la 6. Landa Esperanto-Konkurso la Miŝkolcaj mezlernejanoj akiris 3 unuajn lokojn, bazlernejanoj de Szirmabesenyő 2 unuajn lokojn kaj unu duan lokon.D-rro Ludoviko Győry Nagy *19-an de Julio* raportis pri la okazintaĵoj en Gyula Aŭtune de 1973 la TEK. Komencas 3 lernokursojn en la Rónay, Ady kaj Vörösmarty Kulturdomoj. En la klubo Árpád Szegedi esperantista iluziisto faris demonstracian prelegon, grandsukcese.

*La 26-an de Majo 1974* Ladislao Pásztor faris sukcesan mezgradan lingvo-ekzamenon el lingvo Esperanto. Scion kaj entuziasmon de la ekzamenantoj montris tio, ke ĉiuj sukcese faris ekzamenon antaŭ la ekzameno-komitato de HEA./ antaŭ D-ro Ludoviko Győry Nagy, geedzoj-Pechan kaj Maria Busai. En 1974 oni pli intense ekzercis la konversaciadon en Esperanto, kaj konigis korespondadojn. Oni aranĝis Esperantajn vortludojn, analizis la pedagogajn ilojn, metodojn de la lingvoekzercado kaj esperantlingve raportis pri la okazintaĵoj, sepfoje oni prezentis diafilmojn per esperantlingvaj tekstoj.

Gastoj de la fakrondo pligrandigis nivelon de la kunvenoj. Ankaŭ ĉi-jare aranĝis ĉi tie Mikelo Gergely lian verkistan enketon kaj povis ĝui societon de Mikelo Kökény, budapeŝta instruisto, kies miŝkolcaj kontaktoj jam estas tradiciaj. Denove estis en la klubo eksterlandanoj, dufoje oni akceptis polajn esperantistojn. Instruaĵa estis vizitado de sekretario de Esperanto-klubo de Zalaegerszeg kaj la reciproka spertointerŝanĝo.

Denove rolis pioniroj de Szirmabesenyő kaj Nyékládháza, kiuj prezentis sukcesan programon. La anoj aŭskulteblis raportojn pri la Budapeŝt-a Landa Renkontiĝo, pri la Salgótarján-a kulturprogramo, pri la Szolnok-a Landa Renkontiĝo. Oni sukcesis fari fotokopiojn pri folioj de Esperanto-albumo, kiu prezentas la 10 jaran laboron de bazlernejo de Szirmabesenyő. D-ro L. Gy. Nagy raportis pri la malsupra-Danuba kaj jugoslavia vojaĝoj. Al lia diamantdiplomo anoj de la grupo gratulis.

*En 1974* Adrienne Földi elektiĝis sekretariino de TEK, rekonante la de ŝi faritan turisman agadon. Adrienne Földi finas tiun lernokurson, kiun komencis Márta Váry, sed pro la malsano

ne povis fini. Poste ŝi gvidas ankaŭ propran lernokurson, el inter ties aŭskultantoj unu persono aliĝas al la Esperanto-klubo.

En Esperanto-klubo de „Rónai Sándor" Kulturdomo oni denove rememoris pri Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Zamenhof, serio aŭdiĝis el historio de Esperanto. Estis grandsignifa, ke *somere de 1974* Antoni Sekelj – kiun Adrienne Földi invitis al Miskolc /ŝia korespondamiko estis li ekde la 52-a UK./ - venis al Miskolc. Raporto pri la jugoslava esperanto-vivo farita de la jugoslavia eminenta esperantisto ĉiujn ravis, kiu ilustris la prelegon per koloraj beogradaj diapozitivoj.

En ĉambro de Galerio estis aranĝite raporto de Emeriko Kutas, ĉefsekretario de HEA pri la UK de Kopenhago. Oni konigis esperantlingve vivon de Bartók, vivon de Federiko Karinthy kaj Esperanto-tradukaĵojn de skribaĵoj de Mikelo Gergely. Pro la riĉenhavaj programoj multe da homoj vizitis la klub-okupiĝojn.

Tiu ĉi tempe ankaŭ la fervojistaj esperantistoj estas aktivaj. Ili invitas la budapeŝtajn prelegantojn, kvinfoje partoprenas eksterlandajn aranĝaĵojn, en fervojistaj renkontiĝoj reprezentas la miŝkolcanojn.

*La 30-31-an de Januaro kaj la unuan de februaro* en 1975 okazis vintra renkontiĝo kun karnavala balo en urbo Győr. Partoprenis la 7 membra junularo de Esperanto-fakrondo.de Miskolc.

*La 1-an de Junio 1975* antaŭ ekzamenkomitato de HEA denove multe da homoj faris diversgradajn lingvoekzamenojn. Inter la supergradan Co-diplomon akirantoj estis la Miŝkolca Ladislao Pásztor kaj la en Szikszó instruanta kaj poemojn skribanta Mikelo Farkas.

*La 20-an de Septembro 1975* okazis memoriga evento de nia klubo. Du entuziasmaj geesperantistoj geedziĝis: Adrienne Földi sekretariino de TEK, kaj Ladislao Pásztor, sekretario de Esperanto-fakrondo de la Kulturdomo „RÓNAI, Sándor". Okaze de tiu ĉi evento, Ludoviko Győry Nagy partoprenis la ceremonion, gratulis al la juna paro, poste aranĝis intiman klubvesperon *oktobre*, kaj ili ricevis kristalvazon kiel nuptodonacon.

**Unu epoko finiĝis - morto de doktoro Kolomano Kalocsay**

*La 27-an de Februaro 1976* mortis D-ro Kolomano Kalocsay. Ne nur la hungaraj, sed ankaŭ la eksterlandaj esperantistoj funebris lin. Ĉe lia entombigo ankaŭ la miŝkolcanoj ĉeestis en Máriabesnyő. En la Esperanto-klubo de Londono la 5-an de Marto 1976 la prezidanto de UEA inter aliaj jenajn diris: „ Kalocsay estas unu el la malmultaj homoj, ĉe kiu la fabelo kaj la realaĵo estas sama. Mi sentas min honorigita, ke mi ekkonis ne nur la homon, sed unu historian fenomenon. Mi konis ne nur unu amikon, sed la plej veran, noblan enkarniĝon de la esperantismo. La spirito restas eterne. Ni estu dankemaj, ke Kalocsay vivis....." Pri Teophile Cart forpasita en 1931 -- post 45 jaroj -- diritaj vortoj de Kalocsay estas valoraj ankaŭ ĉe li: „

Ni ĝemas mallerte pro lia forperdo, sed la morto ne estas la fino por la genioj. Li forpasis, ve, mortis, sed liaj agoj restis.”

*Ankoraŭ en ĉi tiu jaro /1976*/ Ildikó Király -- nepino de Ludoviko Király - raportis pri sia Esperanto-vojaĝo en Anglio. Poste oni prezentis pere de sonbendo la muzikigitajn poemojn de D-ro Kolomano Kalocsay kaj liajn parolojn.diritajn en Miskolc en 1961.

*En Aprilo de 1976* D-ro Ludoviko Győry Nagy gvidis delegitaron de la Miŝkolcaj geesperantistoj al Tatranska-Lomnica. La slovakaj esperantistoj rekompencis la vizitadon.

*Somere de 1976* la geedzoj Pásztor faris pollandan rondvojaĝon, dum tiu la Pola Esperanto-Asocio certigis la tranoktejon por la du Miŝkolcaj aktivuloj. La Miŝkolcanoj plurfoje renkontiĝis kun la eksterlandaj esperantistoj pere de la ĝemelurbaj kontaktoj. Ĉi tiujn kontaktojn Ŝtefano Temeŝi, D-ro Ludoviko Győry Nagy organizis. Krome Maria Buŝai, Miŝkolca instruistino organizis reciprokajn vizitadojn inter la bazlerneja Esperanto-grupo de Szirmabesenyő kaj la bulgaraj pioniroj. *Fine de 1976* la TEK-sekretariinajn taskojn Adrienne s-ino Pásztor ne plu povis fari pro persona problemo kaj laboreja okupado kaj ŝi demisiis pri la sekretariina posteno. Poste ŝi partoprenis en la klubvivo, sed en la movada vivo ne. Temis pri tio, ke anstataŭ ŝi la laboron Gustavo Lukács faros, sed la turisman kaj movadan aferojn unue finis mem doktoro Ludoviko Győry Nagy, poste lia novveninta parenco Barnabo Batta faris helpe de Ladislao Pásztor, finante li ankaŭ la taskojn de kluba sekretario. Gustavo Lukács reprezentis la klubon dum la en- kaj eksterlandaj aranĝoj, kongresoj. Li partoprenis iun bazgradan rektan instruadon de Esperanto, laŭ la Ĉeh-metodo. Li akiris tie bonegan rezultan bazgradan diplomon.

## Memoriga landa renkontiĝo en Miskolc

### 1977-1981

### Sep jardekoj, fero-diplomo, kaj pro Esperanto

**300 rolantoj – Gasto: Anna Barla**

*La 23-an de Aprilo 1977* en la teatra salono de Kulturdomo „ RÓNAI, Sándor” pli ol 300 pioniroj (lernantoj el lernejoj: Silkkampa, Vörösmarty, Fadrus, Táncsics-placa kaj Szirmabesenyő) prezentis festan programon okaze de la amikeca semajno. Gvide de fakinstruistino, Maria Buŝai kunsidis faka lanborkomunumo de instruistoj Esperanton. *La 21-22-an de Majo* akiris 16 personoj A-diplomon kaj 3 personoj B-diplomon. Estas bona afero, ke Ildikó Király instruas Esperanton al 10 universitatanoj. *En Marto de 1978* la Miŝkolcaj esperantistoj aranĝas Amikec-vesperon, kiun partoprenas ankaŭ internacia klubo de departementa komitato de la Patriota Popolfronto.

*En Aprilo* D-ro Ludoviko Győry Nagy prelegis en Sárospatak dum la Esperanto-studenta renkontiĝo pri Zamenhof, kreinto de la lingvo.

En Gyula *somere de 1978* estis aranĝita Landa Esperanto-Konkurso. Dum tiu konkurso bazlernejoj de Szirmabesenyő gajnis je la grupkonkurso por la sesaj klasanoj.

La Urbo-centra Esperanto-grupo de Kulturdomo „RÓNAI, Sándor” ŝanĝigas nomon, ĝia nomo estos: „Ora Duopo Kalocsay-Baghy”

La internacia amikeca semajno ĉiam estis taŭga por festi. Ĉi tiel okazis ankaŭ en 1978, la 23-an de Februaro. Tri pedagogoj (Maria Buŝai, sr-ino Károly Olajoŝ kaj Ildikó Zsilka) instruis pionirojn de Szirmabesenyő, precize 60 verdkravatajn lernejanojn. La reprezentantoj de Patriota Popolfronto, Anna Barla kaj Petro Biró rigardis la programon, kiuj estis anoj de la miŝkolca laborista esperanto-grupo gvidita de Adalberto Lehóczky.

*Aŭtune de 1978* la Miŝkolcanoj aranĝis turist-programon. La 3-an titolite al „Aŭtuna migrado”. Ĝin organizis Barnabo Batta.

La 4-a programo por turistoj estis aranĝita fare de Pécs-anoj en 1979.

D-ro Ludoviko Győry Nagy transprenis sian fer-diplomon je la 5-a *de Novembro 1979* en la Universitato Eötvös Lóránt, en Budapeŝto pro sia 65-jara advokata agado.

La TEK de departemento B.A.Z. aranĝis lernokursojn komencan, progresan kaj supergradan en Miskolc en la Kulturdomo „Rónai Sándor”. La lernokursoj gviditaj ĉefe de budapeŝtaj prelegantoj havas 50 partoprenantojn kaj post 10 dimanĉaj antaŭtagmezoj ili ricevis diplomon, per kiuj ili havas rajton por instrui Esperanton.

**Landa renkontiĝo - du-taga programo**

*La 23-an de Januaro 1978* Suzana Barcsay, prezidantino de Landa Esperanto-Instruada Komitato vizitis en Miskolc la laborkomunumon de pedagogoj instruantoj Esperanton kaj Sekcion pri kulturaj aferoj de la departemento.

En la lernojaro 1978/79 lernis Esperanton en 9 lernejoj, en 19 klasoj 311 pioniroj en departemento B.A.Z. La plej multaj Esperanto-lernantoj estis en Szirmabesenyő kaj Miskolc.

La Esperanto-grupo „Ora Duopo Kalocsay-Baghy" salutis D-ron Ludoviko Győry Nagy, prezidanton de departementa TEK *en Marto 1979*, okaze de lia 87. naskiĝtago. El liaj rememoroj pri jaroj 1912-13 pretiĝis sonregistraĵo. En Junio vizitas 3 membra delegitaro al Košice, kie oni aranĝis feston okaze de 55-a jardatreveno de fondiĝo de la Esperanto-klubo. Okaze de la Landa Fervojista Esperanto-Renkontiĝo oni metas novajn tabulojn en Miskolc-Tapolca en Esperanto-parko kaj en strato Julio Baghy.

Dum du tagoj de la 15-a Landa Fervojista Esperanto-Renkontiĝo *(30 Junio – 1 Julio 1979)*

estis memoriga por la partoprenantoj. La fervojistan forumon gvidis D-ro Stefano Bácskay kaj D-ro Jozefo Halász. La tri partan ekspozicion malfermis Robert Szuchy, sekretario de Patriota Popolfronto. Dum la festa kunsido partoprenis Elfride Krause, sekretario de la internacia Fervojista Esperanto-Asocio. Diplomoj de „Mondpaca Esperanto-Movado", la festa kulturprogramo (programo de pioniroj de Szirmabesenyő kaj esperantlingvaj kantoj de vira koruso de Hungara Ŝtatfervoja Veturilripareja Uzino) estis memorigaj.

*La 1-an de Julio* oni aranĝis 3 ekskursojn:

1. Al Aggtelek – florkronado de Esperanto-marmortabulo.
2. Zamenhof-strata kaj Esperanto-placa florkronado. Vizitado de fortikaĵo de Diósgyőr. Ekskurso al Esperanto-fonto.
3. Vizitado al Miskolc-Tapolca al la strato Julio Baghy kaj Esperanto-parko.

**Sep esperantistaj jardekoj – Postmorta „Pro Esperanto"**

La Miŝkolca Sociala Hejmo (pordego Szentpéteri) havis du esperantistajn loĝantojn: Adalberton Lehóczky kaj Suzanan Gerő. La antaŭa estis gvidanto de la Miŝkolca Laborista Esperanto-Movado, la pli lasta nun ellernas la esperantan lingvon. Ankaŭ Suzana estas membro de nova Esperanto-grupo de Miskolc, kiun oni fondis *en Februaro de 1980*, ties nomo estas: Miŝkolca grupo de Sanitara Komitato de HEA. Dum la fondiĝanta kunsido ĉeestas kuracistaj esperantistoj kaj simpatiistoj de Miskolc.

La fondiĝo estis la rezulto de la organiza laboro de d-ro Georgino Körmendy kaj d-ro Paŭlo Zaletnyik

En la grupo Suzana Gerő faradis protokolojn esperantlingve pri la Esperanto-movadaj agadoj. El inter ties fakaj prelegoj multaj estiĝis famaj prezentitaj de anoj enlande kaj eksterlande.

La fondiĝon de la Miŝkolca tria (kun fervojistaj la kvina) Esperanto-grupo D-ro Ludoviko Győry Nagy, prezidanto de departementa TEK jam ne povis sperti. En sia 88.jaraĝo – pro bedaŭrinda strata akcidento – li mortis en *Februaro de 1980.* Li ricevis *la 9-an de Marto 1980,* la „Pro Esperanto" honorigon de HEA, kaj tiun transprenis la Miŝkolcaj delegitoj dum asembleo de HEA, kaj pludonis al la familianoj. Dum lia entombigo en la Avaŝ-monta reformacia tombejo la *23-an de Februaro en 1980*, ĉeestis la Miŝkolcaj esperantistoj, estraro de HEA kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Samideanino Ada Csíszár, zorganto de literatura heredaĵo de D-ro Kolomano Kalocsay diris funebro-parolon en la nomo de HEA.

*Aŭtune* plu daŭras korespondadaj kaj vesperaj lernokursoj en la Kulturdomoj „Vörösmarty" kaj „Rónai Sándor". D-ro Nikolao Fehér faras Esperanto-lingvajn artajn tradukaĵojn kaj gramatikan kompilaĵon, kiujn li prezentadas.

Inter 1978-80 en Miŝkolco faris 45 aŭskultantoj lingvoekzamenojn A kaj B.

## Movado de fervojistoj - Kooperativaj tagoj

Ambaŭ Miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-fakgrupoj organizas lernokursojn kaj aranĝas prelegojn *la 17-an de Februaro 1981.* Partoprenas ankaŭ D-ro Stefano Bácskay, prezidanto de fervojista sekcio de HEA la membrokunvenon de Esperanto-grupo Vörösmarty.Ĉi tiu Esperanto-grupo ekde sia ekesto bone servis aferon de Esperanto. Ekde 1954 funkcias Esperanto-grupo de Hungara Ŝtatfervojo Veturilripariga Uzino. Ĝi alvokis socialistajn brigadojn de la uzino por lerni la lingvon. Ili petas samideaninon Márta Váry, ke ŝi estu kursgvidantino. Sindikato de la fervojistoj protektas tiun laboron. La Junularan Landan Renkontiĝon en Szombathely partoprenis 6 miŝkolcaj junaj esperantistoj.

*En 1981* en Miŝkolco oni aranĝis la Landajn Kooperativajn Tagojn. En apartaj librotendoj oni vendadis esperantajn eldonaĵojn, la miŝkolcanoj volis akiri adeptojn per flugfolioj por Esperanto. Multe da homoj anonciĝis ankaŭ al lernokurso. Landa centro de la Kooperativoj esprimis sian laŭdon al Barnabo Batta, prezidanto de departementa TEK.

*Fine de 1981* la bazgradan ekzamenon faritaj esperantistoj deziris, ke oni aranĝu konversacian, parolkapablecan, evoluigan lernokurson. Multe da esperantistoj anonciĝis al la kvar-monata lernokurso.

## Universala Kongreso kaj Abaújszántó

**1982-1983**

**Strato D-ro Kolomano Kalocsay, muzeo, memorarbo**

### Landa Renkontiĝo

*En 1982* la Esperanto-grupo de la „Rónai Sándor” Kulturdomo jam estas 25 jara. En ĉi tiu jaro Miskolc havas gravan rolon en la direktado de la departementa movado. Denove oni aranĝas *(2- 8 majo 1982*, Balatonfüred) en Hungarlando la Fervojistan Esperanto- Mondkongreson, en kies aranĝado la miŝkolcanoj partoprenis. *La 25-an de Marto* en iu miŝkolca lernejo/Avas, lernejo n-ro 30/ oni aranĝas la departementan sciencan-teknikan pioniran demonstracion, kie estis ankaŭ Esperantaj lingvokapabla konkurso kaj ekspozicio.

La B.A.Z. departementa TEK aranĝis la Landan Esperanto-Renkontiĝon / LER / la 25-26-an de julio 1982. La renkontiĝon partoprenis 50 personoj el diversaj partoj de la lando, eĉ estis ankaŭ jugoslavaj partoprenantoj.Laŭ la unueca opinio la LER sukcesis tre bone, ĉar per la prezento de pitoreskaĵoj kaj historiaj memoraĵoj de Miskolc kaj Nord-Hungario ĝi akiris multe da amikoj por la urbo kaj la departemento.

Dankon al D-ro Ladislao Molnár, adjunkto de la Pedagogia Altlernejo de Sárospatak, kiu malkovris en Abaújszántó, naskiĝdomon de D-ro Kolomano Kalocsay. Tiu loko iĝis pli malfrue Esperanto- memorloko. Granda rezulto de agado de Barnabo Batta, prezidanto de la B.A.Z. departementa TEK estis la prezentiĝo de la naskiĝloko. La grandvilaĝa konsilantaro / Abaújszántó estas urbo ekde la jaro 2004-a./ eternigis la memoron de la mondfama kuracisto, esperantisto, arta tradukisto, poeto kaj lingvisto per stratnomdonado kaj marmora memortabulo *la 21-an de Marto 1982.* La grandsignifan okazintaĵon partoprenis ĉ. cent personoj el la tuta lando. Dankon al la grandvilaĝa konsilantaro, al Jozefo Lénárt, mortinta sekretario de la konsilantaro kaj la la mortinta Gabrielo Bényei, sindikata estro, al Imola Széphalmi s-ino Burkus, kiuj helpis estigi tiun Esperanto-memorlokon. La Abaújszántó-anoj – la konsilantaro kaj la „Petőfi Sándor” Kulturdomo esprimis sian laŭdon por la aranĝo de la neforgesebla memorfesto al la miŝkolcaj esperantistoj. Patrino de la mondfama D-ro Kolomano Kalocsay ripozas en tombejo de Abaújszántó. Lia filo starigis la du metrojn altan nigran marmorobeliskon, kiu jam estas videbla de malproksime.

### Sukcesoj de Miŝkolcaj esperantistoj - Antaŭ pli nova Universala Kongreso

En Miskolc ĉiam pli bone disvastiĝas Esperanto. Ties Miŝkolcaj kulturantoj, disvastigantoj prezentiĝas per belaj sukcesoj. Komputika fakrondo de „Földes Ferenc” Gimnazio prilaboris la Esperantajn lingvajn taskojn helpe de komputilo. Por tiu prilaborita tasko ili gajnis dum iu

internacia konkurso – aranĝita en Budapeŝto – la ĉefpremion, unu komputilon. La famon kaj fotojn de la gajnintoj Budapeŝta Informilo, fakgazeto komunikis sur la titolpaĝo.

D-ro Nikolao Fehér, ano de Esperanto-fakrondo de Kulturdomo „Rónai Sándor” tradukis poemojn de Petőfi kaj ceterajn poemojn, per kiuj li atingis sukcesojn. Tiujn tradukaĵojn publikigis HUNGARA VIVO kaj ankaŭ la centra gazeto de la Itala Esperanto-Asocio. Liaj artikoloj kaj humuraĵoj aperas ankaŭ en Budapeŝta Informilo.

Samideano Barnabo Batta rolis sukcese en Pollando en literatura konkurso de Monda Turismo. Tiel li gajnis rajton partopreni la kongreson de la svedaj esperantistoj.

D-ro Vidor Csiky ofte rolas en programo de la Kalocsay-Baghy Ora Duopo-grupo, kiu tradukis al Esperanto verkojn de Csingiz Ajtmatov.

Esperantistoj de la Miŝkolca Vörösmarty Kulturdomo invitis d-ron Franciskon Jáki, anon de la Instrua Komitato de HEA; li prelegis per projektitaj bildoj, grandsukcese. Ankaŭ la Medicina Esperanto-grupo de Miskolc havas multe da aranĝaĵoj. Suzana Gerő senlacige organizas la grupanojn kaj prelegas hungarlingve pri Esperanto por handikapuloj.

En multe da bazlernejoj en Miskolc okazas siateme lernado de Esperanto,. En la Táncsics-placa bazlernejo oni same instruas sisteme Esperanton kiel duan elektitan lingvon. Ankaŭ la bazlernejo de Szirmabesenyő atingis elstarajn ssukcesojn. Ĝojinde estas, ke la komunumo de la Esperantan lingvon intruantaj pedagogoj ĉiam pli grandiĝas, ĉiam pli multaj akiras la rajton instrui Esperanton.

**Universala Kongreso - 5000 partoprenantoj el 60 landoj**

*En 1983* aranĝanto de la 68a Universala Kongreso estas Hungarlando, ĝin partoprenis pli ol 5000 gastoj inter ili multegaj delegitoj el 60 landoj. Ankaŭ la departementaj kaj Miŝkolcaj esperantistoj entuziasme prepariĝadas por partopreni la kongreson. Ili estis plurkiale interesitaj en sukceso de la kongreso. La eldonejo „Belarta Fondaĵo” eldonis tri seriojn da koloraj bildkartoj, iniciate de Barnabo Batta. Sur tiuj estis videbla la verda, kvinpinta stelo de Esperanto kaj emblemo de la Universala Kongreso.

La unua serio prezentas la ĉefurbon kaj niajn kvar regionajn grandurbojn, inter tiuj Miŝkolcon. Tio estas unika en la mondo.

La Miŝkolca Kuracista Medicina Esperanto-Fakgrupo laboras ĉiam pli vigle. *Fine de Julio,* 5 personoj partoprenis en Ĉeĥoslovakio en Poprad internacian kuracistan kongreson. Samtempe 5 personoj entreprenis kuracistan servadon dum la Budapeŝta Universala Kongreso, helpante la laboron de la kongreso.

Kvin lernantoj de bazlernejo de Szirmabesenyő rekompence povis partopreni programon de gejunuloj.

**Internacia vinkonkurso - D-ro Kolomano Kalocsay-memorĉambro**

*La 1983-jara* vinkonkurso estis aparta programo de la okazintaĵoj en Abaújszántó, pri kiu ankaŭ la internacia Esperanto-gazetaro rememoris. 40-specaj diversaj drinkaĵoj / vino, brando, ĉampano/ konkuris antaŭ oficiala, ŝtata fakĵurio. La de la diversaj entreprenoj kaj institucioj ofertitajn premiojn gajnis finnaj /la ĉefpremion Osmo Buller/, hispanaj, hungaraj kaj francaj esperantistaj konkursantoj, kiuj ricevis de la ĵurio ankaŭ diplomojn. La bone organizita, bonetosa konkurso estis unika en la historio de la Esperanto-movado. La miŝkolcaj kaj lokaj esperantistoj faris bonan organizan laboron.

Em la Lokhistoria Muzeo de Abaújszántó, konsente kun la Borŝod-Miŝkolca Muzea Organizaĵo elformita D-ro Kalocsay- memorĉambro malfermis novan epokon en la vivo de la grandvilaĝo.Ĝia festa inaŭguro okazis *dum la 1983-jara Hungarlanda U.K.*, en ĉeesto de grandnombra ekster- kaj enlanda esperantista delegitaro. Ĝin ĉeestis ankaŭ pluraj mondfamaj esperantistaj poetoj, verkistoj kaj lingvistoj. La tuttaga kultura kaj literatura programo starigis vere laŭmeritan memoron al la naskito de la grandvilaĝo. Tiutempe, la 3-an de Aŭgusto 1983oni plantis sur la korto de la muzeo de Abaújszántó la D-ro Kalocsay- memorarbon, iun arĝentan piceon / Picea pungens var. Argentea./.

Grava okazintaĵo de la tuttaga aranĝaĵo estis la fondo de la Internacia Kalocsay-Memorkomitato, kies anoj iĝis kelkaj BAZ-departementaj kaj miŝkolcaj esperantistoj, rekone al tiu organiza laboro, kiun ili faris en la elformigo de la Esperanto-vivo de la grandvilaĝo.

La grandvilaĝa konsilantaro de Abaújszántó *en Februaro de 1984* dum iu festa kunsido decidis pri farigo de Kalocsay-memorbusto kaj ĝia starigo en la korto de la muzeo. Por ĉi tiu celo ĝi voĉdonis unuece 40000.-forintojn. La invititaj 10, lokaj, ŝtataj, kooperativaj entreprenoj aliĝis al la oferto, kaj ankaŭ en ĉiuj ceteraj laboroj ili promesis siajn helpojn. La konsilantaro, bonvenigante la helpojn de la entreprenoj, donacis al la reprezentantoj de ĉi tiuj entreprenoj Kalocsay-portreton. Ankaŭ s-ro Barnabo Batta ricevis memorportreton kaj laŭdon.

Ada Csíszár, estrino de la Internacia Komitato por Honoro al D-ro Kálmán Kalocsay, kaj perantino de la Miŝkolca Esperanto-Movado preparis esperanttlingvan priskribon de la vivo kaj verkaro de d-ro Kolomano Kalocsay prepare al la eldono de libro, kiu enhavas 8300 prozajn vicojn, 1430 versojn, 3165 biografiajn indikojn kaj 235 fotojn.

*En Decembro de 1983* la bazlernejo n-ro 40 de Miskolc prezenzis sian memstaran Esperanto-programon.

En la bazlernejo n-ro 24 de Miskolc Esperanto jam estas elektebla lernobjekto. Ĉi tiuj rezultoj laŭdas la laboron de s-ino Zoltán Kővári kaj s-ino Zoltán Szabó Pap, direktorinoj.

S-ino Gyula Várhelyi, pedagogo instruas Esperanton, lingvon de la paco kaj amikeco en bazlernejo de Tokaj.

**Junulara grupo - 165 000 Esperanto-bildkartoj**.

37 pedagogoj ricevis post lernokurso la diplomon kaj permeson por instrui la esperantan lingvon. Ĉi tiel vigliĝis ankaŭ en la mezlernejoj instruado de la lingvo. En marto de 1985 en la „Rónai Sándor” Kulturdomo gelernantoj de miŝkolcaj lernejoj Bláthy Ottó Fakmezlernejo, gimnazioj /Kossuth, Földes, Zrinyi/ prezentiĝis, ili donis memstaran programon. La evoluigon de lerneja instruado de Esperanto helpis aktive la Kultúra Klaso de la BAZ-departementa Konsilantaro. La pedagogoj, kiuj finis la intensivan lernokurson, partoprenas prefektigan kurson. Iliaj gvidantinoj estas Maria Busai, nomumita fakinspektisto kaj Ildikó Király, kunlaborantino de fremdlingva katedro de Miŝkolca Universitato.

*La 19-an de Aprilo 1985* junuloj fondas la Miŝkolcan Junularan Esperanto-Grupon, kiu portis nomon de Ludoviko Király. La grupo funkcias laŭ bazstatuo de HEA. Laboron de la grupo helpas Georgina Koltay kaj Ladislao Kövér.

*Inter 1982-85* Barnabo Batta faris grandmezuran koloran bildkarto-eldonadon kaj dissendis de Miskolc. Sur la bildkartoj estis Esperanto-skribaĵoj. En 1982 jam la unuaj 20 000 pecoj elĉerpiĝis. Okaze de la Budapeŝta Universala Esperanto-Kongreso prepariĝis 100 000 pecoj kaj ankaŭ ili elĉerpiĝis kaj atingis kaj Eŭropajn landojn kaj transmarajn. En 1984-85 25 000 bildkartoj pretiĝis pri memorlokoj de Abaújszántó.

De 1983 samideano Barnabo Batta, Miŝkolca, departementa konsignatulo vendis esperantlingvajn librojn, lernolibrojn, vortarojn, gramofondiskojn, sonbendojn ĝis 1985 pro 100.000.-forintoj, ĝis 1988, pro 200.000.- forintoj. Li farigis per Esperanto-emblemoj karto-kalendarojn, globkrajonojn kaj aliajn eldonaĵojn.

*En 1985* okazis malgaja okazintaĵo. *La 27-an de Aŭgusto* forpasis Francisko Czakó, eksa sekretario de Esperanto-Fakrondo de la Hungaraj Ŝtatfervojoj Veturilripariga Uzino. Li estis organizanto de multaj Miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-renkontiĝoj.

Miŝkolcaj esperantistoj faris ŝtatan lingvoekzamenon eĉ pli frue en Budapeŝto.

*En 1986* en Miŝkolca Universitato okazis ŝtataj lingvoekzamenoj pri Esperanto, faritaj de loĝantoj el urboj Miŝkolco Nyiregyháza, Budapeŝto.

## Esperanto ankaŭ en la mezlernejoj

**1984-1986**

**Jaro de pedagogoj - Antaŭ dudek jaroj oni komencis instrui Esperanton.**

*En 1984* tre ege vigliĝis la instruado de Esperanto en Miskolc kaj en BAZ-departemento, dank' al s-ro Barnabo Batta, kiu faris bonan propagandon kaj organizadon inter la pedagogoj. La intensa lernokurso havis 50 partoprenantojn, post kiu pli ol 40 pedagogoj faris sukcesajn ekzamenojn en Julio kaj en Septembro, el inter tiuj 30 personoj anonciĝis al perfektiga kurso, kie ili ricevis preparon al mezgrada „B"-lingvo-ekzameno.

Estas tre ega sukceso, ke en 3 miŝkolcaj mezlernejoj, en unu Leninurba, 4 Miŝkolcaj bazlernejoj kaj 11 regionaj bazlernejoj 23 pedagogoj instruas oficiale la Esperantan lingvon, sume al 320 gelernantoj.

Post la 1964 / 65a unua lernojaro en la kulturdomo de Szirmabesenyő la infanoj prezentis al la gepatroj kaj gastoj la lernitaĵojn. Fotoj gardas entuziasmajn anojn de la unuaj grupoj, sonbendoj gardas la esperantlingvajn kantojn, poemojn. La programojn la infanoj anoncis kaj hungare kaj esperante. Ekde tiam pasis 20 jaroj. Se ni komparas la malnovajn kaj 1984-jarajn martajn sonbendojn kaj fotojn, ni havos agrablajn travivaĵojn. Tio estas vera kulturhistoria valoraĵo, tio ne perdiĝos por la posteularo.

Nome pluraj albumoj konservas la fotojn, desegnaĵojn, gazetartikolojn, memorojn, kiuj donis eminentan rangon al ĉi tiu eta komunumo, multfoje rolinta dum Universalaj Kongresoj, ankaŭ eksterlande. De jaro al jaro estas kutima vidaĵo, ke sidas inter la aŭskultantoj Maria Busai, instruistino, kiu komencis instrui al la unuaj lernantoj antaŭ 20 jaroj la simplan, logikan, 28 literojn, 35 prepoziciojn, 35 afiksojn havantan lingvon. Apud ŝi ŝia disĉiplino, Terezia Csík Bodnár sidas, ankaŭ al ŝi estas dankeblaj la atingitaj sukcesoj. Ankaŭ Márta Váry helpis sisteme la instruadon ekde la komenco per fakliteraturo. En Miskolc du lernejoj / la 40-a kaj la 24-a / entreprenas pioniran rolon sub gvidado de direktorinoj s-inoj Zoltán Kővári kaj Zoltán Pap Szabó. **En 1984** oni aranĝis Landajn Esperantajn Junularajn Tagojn en la Universitato de Miskolc, en ties organizado partoprenis ankaŭ la Miŝkolcaj esperantistoj.

**Nova estraro - Busto de D-ro Kolomano Kalocsay**

La Espranto-grupo Ora Duopo Kalocsay-Baghy *en 1986* aranĝas fakajn prelegojn kun lumbildprojekciado, esperantlingve. Estis prelegoj pri lokhistorio de Miskolc, pri Esperanto-instruado de Szirmabesenyő, pri agrikulturaj metodoj. Estis literaturaj vesperoj.

*La 23-an de Januaro* la grupo elektas novan estraron. Honora prezidantino estas Márta Váry,

Prezidantino estas Zoltán Kővári, organizanta sekretario Ladislao Pásztor, ekonomia respondeculino estas s-ino Jenő Rácz, junulara respondeculo: Norbert Paár, fakrond-gvidanto estas Stefano Pál. / Márta Váry estas ano de estraro de HEA./

*La 2-3-an de Majo* en Szombathely dum la Landa Esperantlingva Deklamkonkurso en pionira kategorio Marietta Szabó/Szirmabesenyő/, en junulara kategorio Livia Koncsol /Miskolc/ kaj ĉe plenkreskuloj Eszter Faragó akiris la elstaran duan lokon.

D-ro Georgina Körmendy rezignis pri la sekretariina ofico ĉe la Kuracist-Sanitara Esperanto-

Fakgrupo. La grupo kunvenis anstataŭ la Departementa Hospitalo en la Semmelweis-hospitalo en Miskolc. La grupon reorganizis D-ro Paŭlo Zaletnyik post du jara paŭzo.

*La 9-an de Novembro 1986* la Miŝkolcanoj denove vojaĝas al Abaújszántó. Ili tie inaŭguras buston de D-ro Kolomano Kalocsay.

Je iniciato de Barnabo Batta skulpto-artisto Zsolt Jószai, faris la buston. Dum la inaŭgura festo partoprenis multaj anoj de la Internacia Kalocsay-Societo. / Ĉi tiu publikplaca statuo estas la unua Esperanto-statuo en la tuta mondo./ D-ro Vilhelmo Sághy, emerita ministro, prezidanto de HEA manifestis grandvilaĝon Abaújszántó al Esperanto-memorloko. Por ties realiĝo aktive agadis Ladislao Molnár, ĉeflerneja instruisto, Jozefo Lénárt, sekretario de Konsilantaro, Gabrielo Bényei, sindikata estro kaj Stefano Homonnay, Abaújszántó-anoj.

*En 1986* instruistino Maria Busai, faris sukcesan supergradan ŝtatan lingvoekzamenon el la Esperanto-internacia lingvo. en la „Eötvös, Lóránd” Scienca Universitato

## Esperanto - lingvo de Zamenhof estas cent jara

**1987-1988**

**En Miskolc estas ses Esperanto-nomiĝoj**.

**La lingvo estas cent jara - Jubileo en la Parlamentejo**.

*En 1987* regis sama festa etoso tutmonde, kiel en 1959, kiam en Varsovio oni rememoris je centa datreveno de naskiĝo de kreanto de la lingvo, Zamenhof.

Nun oni festis tion, ke la unua lernolibro de Esperanto antaŭ cent jaroj aperis. En jaro de la jubileo oni rememoras ankaŭ en Miskolc la lokan datrevenon kaj en la eldonaĵoj la rememoroj ricevas lokojn. Samaj estas la dato de la du tagoj. La 13-an de Julio 1957 estis la I. Nordhungarlanda Esperanto-Renkontiĝo kaj 70-a datreveno de Esperanto. Ĉi-tage oni inaŭguras la marmormemortabulon de la Esperanto-placo.

Kelkaj Miŝkolcaj esperantistoj vojaĝas al Varsovio kune kun geedzoj Lukács el la Ora Duopo Kalocsay-Baghy Esperanto-grupo. Okaze de la jubileo tiu grupo florkronas la Esperanto-memorlokojn: en la Zamenhof-strato, en Esperanto-placo, en Julio Baghy-strato, en Esperanto-parko.

**Rememoro okazis pri la Kossuth-strata Esperanto-grupo**

Anoj de la Ora Duopo Kalocsay-Baghy Esperanto-grupo faris ekskurson al la fonto Esperanto.

*La 16-an de Marto* en la Junulara domo okazis prelego pri pasinto de Miskolc kun lunbildprojekciado kaj poste la Junulara Grupo aranĝis klubvesperon.

La HEA aranĝas en la Parlamentejo sian jubilean memorkunsidon, kien ĉiuj miŝkolcaj kaj departementaj grupoj ricevas invitilon. Dum tiu ĉi ricevas Maria Busai por sia pedagoga laboro honorigon kaj Barnabo Batta honoran insignon de Mondpaca Esperanto-Movado./ MEM /

*En komenco de 1987* okazis iniciato, ke estu strato en Miskolc nomita pri D-ro Kolomano Kalocsay. En intereso de tiu ĉi afero la departementa TEK petas helpon de Patriota Popolfronto plurfoje. Oni petas ankaŭ helpon de Ada Csíszár, kiu estas zorganto de literatura heredaĵo de D-ro Kolomano Kalocsay.Ŝi servigis tre ege valorajn indikojn., dokumentojn.

**D-ro Kolomano Kalocsay-strato**

*Printempe de 1988.,* kiu jaro estas 75. jaro de la Miŝkolca Esperanto-Movado, realiĝis la stratonomdono pri D-ro Kolomano Kalocsay. La unuan proponon de la Konsilantaro rifuzis, ĉar en Miskolc jam estas Kalocsa-strato. *La 1-an de marto 1988* oni denove petis la Konsilantaron al akcepto de la propono per subskriboj de Éva Gyulai, prezidantino de la Patrujkona Komitato kaj Barnabo Batta, prezidanto de la Departementa Esperanto-Komitato. Ĉi tiun proponon la Urba Konsilantaro la 17-an de marto 1988 akceptis. Ĉi tiel okazis, ke D-ro Kolomano Kalocsay, kiu ankaŭ en 1913 gravan rolon ludis en vivo de Miŝkolca Esperanto-Movado, post 75 jaroj denove viciĝis apud nomojn de Zamenhof kaj Baghy.

*La 5-an de Marto 1988* apud provizoran Zamenhof-memortabulon oni metas marmortabulon, kiun inaŭguras kaj florkronas Marta Váry kaj Barnabo Batta okaze de 100. datreveno. La inaŭguran parolon diris Ladislao Pásztor, organizanta sekretario de la Ora Duopo Kalocsay-Baghy

**Esperanto-grupo. Lernejanoj de Szirmabesenyő donis festan programon**

*La 27-an de majo 1988* en teatrejo de „Rónai Sándor" Departementa Kulturdomo estis Esperanto-infantago. Dum tiu rolas 200 gelernantoj de la Miŝkolcaj 24. kaj 40. bazlernejo, 3.lernejoj de Leninurbo kaj bazlernejoj de Abaújszántó, Hernádnémeti, Szirmabesenyő. Ilia memstara programo havis grandan sukceson. Ĉiuj lernejoj ricevis honoran diplomon. Julio Bossányi la direktoro de bazlernejo de Szirmabesenyő ricevis „Por Esperanto" memormedalon.

Sendube la plej grava okazintaĵo de la 75. jaro estis la Landa Esperanto-Renkontiĝo *la 18-21-an de aŭgusto 1988.*

Dum la unua tago: Estis florkronadoj de tomboj de D-ro Ludoviko Győry Nagy kaj Ludoviko

Király. Poste vizito okazis al la fortikaĵo de Diósgyőr, vespere sekviĝis la Interkonatiĝa vespero.

Dum la dua tago: Ekspozicio estis rigardebla el okazintaĵoj de la 75 jaroj, artista vespero, pacmarŝado kun la Miŝkolcaj maĵoretoj.

Dum la tria tago: Estis fortikaĵhistoria promenado en departemento-Zemplén:

Boldogkőváralja – Vizsoly – Gönc – Fűzér – Sárospatak.

Dum la kvara tago: Okazis du alternativaj programoj: aŭ banado en la termal,-kaj grotbanejo

De Miskolc-Tapolca kaj promenado en Miskolc-Tapolca; aŭ ekskurso al

Abaújszántó.

Dum la Renkontiĝo la geedzoj Lukács farigis insignitajn vir- kaj virinĉemizojn per bildo de la Miŝkolca-Televidturo kaj per dato de la Landa Renkontiĝo kaj verda stelo por vendi ilin kolorigante per tiu ago la Landan Renkontiĝon. Ili havis grandan sukceson per ilia ideo, sed restis ĉe ili multe da varoj ne venditaj.

Ĝis 1988 la subaj Esperanto-memorlokoj estiĝis en Miskolc:

| | |
|---|---|
| 1. Esperanto-placo | 1957. |
| 2. Zamenhof-strato | 1960. |
| 3. Esperanto-fonto | 1960. |
| 4. Esperanto-parko | 1969. |
| 5. Julio Baghy-strato | 1977. |
| 6. Dr.Kálmán Kalocsay-strato | 1988. |
| 7. Korrach Mór strato | 1988 |

*Ĝis 1988* la subaj geesperantistoj estis anoj kaj delegitoj de UEA:

- D-ro Stefano Győry Nagy
- D-ro Ludoviko Győry Nagy
- Ludoviko Király
- Doktorino Jolán Gózon-Fodor
- S-ino Márta Váry
- S-ro Stefano Temesi
- Doktoro Jozefo Halász

*Ĝis 1988* Miŝkolcaj anoj de la Landa Komitato de HEA estis:

- D-ro Ludoviko Győry Nagy / ĝis 1980. /
- Barnabo Batta
- Maria Busai
- Ladislao Pásztor

*Post la reĝimŝanĝo* / 1989 / estis spertita la grandskala malvigliĝo koncerne la poresperanto agadon en historio de la Miŝkolca Esperanto-Movado. La societojn helpantaj subtenoj ĉesis kaj perdiĝis financa garantio por la lerneja lingvo-instruado kaj kulturo kaj amuzigaj celoj.

*En 1989* okazis la 25-jara jubilea festoserio de bazlernejo de Szirmabesenyő. SinjorinoTerezia Csík-Bodnár kaj Maria Busai vojaĝis al Szombathely kun siaj disĉiplinoj al la Landa Deklam-konkurso kaj sukcese rolis. *En Februaro* ili rolis kun la 40. Miŝkolca bazlernejo, kiujn instruis la direktorino Zoltán Kővári.

Somere ili partoprenis Landan Studkonkurson, post tiu en Sárospatak ili estis en departementa faktendaro.

La *17-an de Novembro 1989* okazis jubilea aranĝo en „Petőfi Sándor” Kulturdomo de Szirmabesenyő okaze de 25 jaroj de Esperanto-lingvoinstruado en lernejo de Szirmabesenyő.

Ĉi tiun aranĝaĵon organizis lernejo de Szirmabesenyő, la Grandvilaĝa Konsilantaro kaj BAZ-departementa Teritoria Esperanto-Komitato de HEA. En la programo okazis malfermo, rememoroj, salutoj, literatura programo kaj ekspozicio.

*En 1991 la 16-an de Februaro* la kunvokita ĝenerala asembleo ĉesigis BAZ-departementan Komitaton de HEA kaj samtempe fondis la Nordhungarian Esperanto-Asocion, kiun la BAZ-Departementa Tribunalo registris *la 21-an de Junio 1991*. La Asocio devis translokiĝi pro la tro granda ĉambro-lukotizo. Unue ĝi ricevis lokon en la Miŝkolca „Kossuth” Gimnazio, post 2 jaroj translokiĝis en domon de Miŝkolca societo de la Pedagogia kaj Metodika Instituto. /Miskolc, nr. 35. str. Széchényi./ La Asocio iĝis memstara societo de HEA. Ĝia prezidanto estis Barnabo Batta, sed li poste rezignis sian oficon pro la malbona sanstato de lia koro.

De 1992 Maria Busai instruas la esperantan lingvon ankaŭ en la Miŝkolca Gimnazio „Kossuth”.

*La 23-an de Aprilo 1993* oni elektis samideanon Stefanon Szörényi kiel prezidanton de la Asocio. Sekretario estas Gustavo Lukács, vicprezidantino estas s-ino Istvánné Fedor, ekonomia respondeculino estas s-ino Jozsef Szombathy. Ano de la estraro estas Nikolao Fázold.

Al nomoj de Gustavo Lukács, Nikolao Fázold, s-ino József Szombathy ne kontaktiĝas memstaraj organizadoj de Esperanto-aranĝaĵoj, lernokursoj, aŭ literaturaj agadoj.

Sed sinjoro Gustavo Lukács estis la plej bona kunaganto de prezidanto Barnabo Batta. Eva, edzino de Gustavo Lukács same esperantisto estis, kiu multe helpis ŝian edzon en la poresperanto-agadoj.

*En 1993* la Asocio konkursis du subtenojn: al „Norda Panoramo” titola gazeto, al aranĝado de 80. jubilea jaro kaj helpo de la lingvoinstruado. Ili ricevis 30000.- forintojn de la „Departementa Mecenata Fondaĵo”, el kiu eldonis jubilean numeron de la gazeto kaj metis memortabulon en la miŝkolca D-ro Kolomano Kalocsay-strato. Inaŭguro de la marmortabulo

*Okazis la 27-an de Februaro 1994*, la 18. datreveno de morto de D-ro Kolomano Kalocsay. De 1994 en la Bazlernejo de Szirmabesenyő, pro direktoroŝanĝo la lingvoinstruado de Esperanto ĉesis.

Post morto de Stefano Szörényi, *en 1995*, la nova prezidanto de la Asocio estiĝis s-ino Elizabeta Tőke Raisz, kiu per monhelpo de Barnabo Batta, aranĝis memorfeston pri Kalocsay en Abaujszántó.

*En 1996* Ildikó Király sinjorino D-ro Vu partoprenis la eminentan verkantaron, de la Hungara-Esperanta Mezmezura Vortaro, laŭ la invitanta doktorino Helena Koutny..

*Inter 1998 – 2001 jaroj* en Miskolc en la ekfunkciantaj diversaj lingvolernejoj Maria Busai instruas por plenkreskuloj la lingvon internacian.

*En la 2000-a jaro* Helena Stefano Fedor, instruistino faris mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon el Esperanto. Ŝi instruas la esperantan lingvon kaj al bazlernejanoj kaj al plenkreskuloj.

*De 2002* Maria Busai, instruistino instruas la esperantan lingvon por plenkreskuloj, en la Miŝkolca „Saturnus" lingvolernejo La „Norda panoramo" titolan informilon oni devis paŭzigi ankaŭ plurfoje pro la ĉiam pliigantaj kostoj. En vivo de la Asocio gravaj okazintaĵoj ne okazis, dum la kunvenoj seninteresecо regis. Pro ĉi tiuj kaŭzoj la membraro ne deziris vizitadi la kunvenojn.

***La Asocio malfunkciiĝis en jaro 2003, oni viŝis ĝin pri la prokurlisto***.

## Rekomenco post nova paŭzo - Ne estas permesata, ke ni lasu perdi la jam kreitajn valorojn

*En 2005,* la Miŝkolcaj geedzoj Pásztor komencis interesiĝi: kie estas la miŝkolcaj esperantistoj? Ili tiel informiĝis pri tio, ke la Nordhungaria Esperanto-Asocio ĉesis en 2003. Ili interesiĝis pri esperantistoj ankaŭ en aliaj departementaj komunumoj. La rezulto estis malesperiga.

Ili decidis, ne forgesi tiujn valorojn, kiujn la prauloj estigis. Ili tiel sentis, ke oni devas serĉi la iamajn, ankoraŭ vivantajn anojn kaj devas organizadi plu. Al tio donis helpon samideanino Ada Csíszár, kiu proponis, ke iu de la geedzoj Pásztor estu ano de UEA kaj ili ambaŭ estu anoj de HEA. Nome nuntempe en Miskolc ne estas urba HEA-ano, nur unu fervojisto.

Al fondo de iu amika rondo, s-ino Ada Csiszár proponis kiel helpulon, Johanon Orosz.

Tiel fondiĝis en Miskolc ***la 5-an de Majo en 2005*** la „Király Lajos" Esperanto-Amika Rondo, kies fondantaj membroj estas:
-Adrienne Földi s-ino László Pásztor
-S-ro Ladislao Pásztor
-Suzana Gerő s-ino Parkánszki
-Helena, s-ino Fedor
-s-ro Jozefo Dudás
-s-ro Johano Orosz
- Ildikó Király, s-ino d-ro Vú

Ili konsentis pri tio, ke la amika rondo ne estu registrita societo kaj ne estu membrokotizo. La eventualajn kostojn la membroj pagas komune.

Nomo de la amika rondo estu:
„Király Lajos" Eszperanto-Amika Rondo.

Oficoj ne estu, ja la anoj estas amikoj unu de la alia. Anoj de la amika rondo ne deziras esti anoj de HEA, volas esti sendependaj. Iliaj celoj estas la subaj:
- jardatrevenaj florkronadoj de la Esperanto-memorlokoj;
- unufoje en monato duhora amika parolado esperantlingve dum la unua merkredo de la monato inter horoj 17-19.
- ekzerciĝo en la esperantlingva parolado.
Pli malfrue la celoj plimultiĝis. La geedzoj Pásztor spertis tion, vizitante en Junio 2005 la Dro Kalocsay-memorĉambron en urbo Abaújszántó, ke ekde ĝia ekesto oni ne ofte vizitis ĝin.
Tio donis la novan celon: konigo de memorlokoj de niaj pli malvastaj regionoj por en- kaj eksterlandanoj.

La „Király Lajos" Esperanto-Amika Rondo estas atingebla laŭ la subaj eblecoj:
Lászlóné Pásztor, 3530. Miskolc. Strato Arany János, nro 35. IV./2.
Hejma telefono + 36 46 738 982

Poŝtelefono +36 70 570 8895
Retadreso: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu / pasztorne.adri@gmail.com
La retgazeto estas atingebla laŭ la suba retpaĝo:
http://kiralylajos.uw.hu

Kontaktoj de la EAR „Király Lajos” estas: UEA kaj ĉiuj Esperanto-Asocioj, Ligoj, Federacioj troveblaj en la Jarlibro de UEA, krom la kromaj personoj kaj ceteraj Esperantofondaĵoj.

# Agado de Miŝkolc urba „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo en 2005

## Agado por estonto

*En Junio* geedzoj Pásztor vizitis la Urbestraron kaj kulturdomon en Abaújszántó por informiĝi kiel statas tie la lingvo Esperanto, ties instruado kaj la Kalocsay memoraĵoj. Ili konstatas, ke lingvoinstruado jam ne daŭras, kunvenoj de geesperantistoj jam ne okazas, Tamen Abaujszántó gardas siajn memoraĵojn. Abaújszántó ne forgesas kaj se geedzoj Pásztor volas fari tie literaturan memorfeston, la urbestraro apogos ĝin. La urbestro sinjoro Zoltán Soltész kaj geedzoj Pásztor konsentis por kune aranĝi memorfeston en oktobro la 6an.

*La 25-an de Aŭgusto 2005* okazis florkronado ĉe la tomboj de la nomdonanta Ludoviko Király kaj d-ro Ludoviko Győry Nagy. Ĉirkaŭ la pli lasta tombo Ladislao Pásztor, instruisto de ĝardenkulturo-ĝardeninĝeniero plantis perenojn, kontenerajn piceojn kaj aliajn ĉiamverdajn florojn.

*En Septembro 2005* estis vizito de la kunveno de la Interreta Societo de Hungaraj Artkreantoj en Tarcal. Tie multe da verkistoj kaj poetoj prezentis siajn verkojn, sed estis ankaŭ belartaj kreaĵoj. Anoj de la societo ĝojis, ke povis konatiĝi kun esperantistoj. Estis tie Jozefo Dudás, Ernesto Könczöl el Eger kaj geedzoj Pásztor

*De Septembro 2005* Ladislao Pásztor ekredaktis etan gazeton. Unue tajpitan per skribmaŝino por memorigi pri fondiĝo de la Amika Rondo kaj pri la en Abaújszántó kaj Tarcal faritaj vizitadoj.

**Pli nova celo naskiĝis**: zorgado de la Kalocsay–memorlokoj en Abaújszántó kune kun la Miŝkolcanoj. En intereso de tiu ĉi celo komencis redakti Ladislao Pásztor kune kun sia edzino gazetorganon de la amika rondo, la „Nordhungarian Informon”, kiu aperas ĉiumonate, jam ekde novembro en cifereca formo.

La gazeto okupiĝas pri okazintaĵoj de la en- kaj eksterlanda Esperanto-movado, rememoras pri jardatrevenoj, publikigas rakontojn, poemojn el la hungara kaj esperanta literaturoj kaj krome interesaĵojn kaj aktualaĵojn.

Ĝia turista rubriko prezentas vidindaĵojn de la Nordhungaria Regiono.

## Memorfesto en Abaújszántó – gasto ankaŭ el Slovakio

La membroj de Király Lajos EAR aranĝis memorfeston *en Oktobro 2005-a* en Abaújszántó helpe de la Urba Konsilantaro okaze de 114a jardatreveno de la naskiĝo de d-ro Kolomano Kalocsay.
Kaj la urbestraro kaj la gelaboruloj de la Kulturdomo „PETŐFI” kaj la geesperantistoj metis florkronojn en la Kalocsay-memorĉambro al la Kalocsay busto kaja l la memorrtabulo de Kalocsay strateto.

Ankaŭ Theodor Andreas, reprezentanto de la slovakaj esperantistoj / Košice/ metis florkronon tie kaj ĉe la tombo de la patrino de d-ro Kolomano Kalocsay, en la tombejo de Abaújszántó.

En la tombejo dum la pietata vizitado s-ino László Pásztor diris la „Patro nia…" komencan preĝon esperantlingve.
En la memorĉambro Zoltán Soltész, urbestro diris la festan parolon hungarlingve, poste Barnabo Batta alparolis esperantlingve. Nome de HEA parolis d-ro Endre Dudich, vicprezidanto de HEA. La geedzoj Pásztor parolis pri la verkaro de d-ro Kolomano Kalocsay.

Sinjoro Renato Corsetti sendis saluton de UEA helpe de reto, sed ankaŭ aliaj en- kaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj bonvenigis la iniciaton de la Miŝkolcanoj.

**Urba televido de urbo Encs rememoris pri la malofta evento**

Ankaŭ la urba televido de Encs memoris pri la festo.

Dum la festo 5 disĉiplinoj de Helena sinjorino Stefano Fedor el la Miŝkolca Komlós-montopinta bazlernejo prezentis festan programon ĉe la Kalocsay-busto.
Inter la partoprenantoj de festo estis 7 membroj de la EAR Király Lajos, krome Maria Busai kaj Miklós Fázold, Barnabo Batta, doktoro Endre Dudich, Ernesto Könczöl el Eger, doktoro Ernesto Gaál el Szerencs kaj Teodoro Andreas el Slovakio krom la geesperantistoj kaj interesantoj de Abaújszántó.

*De decembro 2005* faris la revizion de la Nordhungaria Informo d-ro Emeriko Ferenczy. Renato Corsetti, prezidanto de UEA fidis pri la sukceso de la gazeto, tial en intereso de la internacia atingebleco la „Király Lajos" Esperanto-Amikan Rondon membrigis al la listo „Lokaj Esperanto-grupoj".

Kiel eĥo je fondiĝo de la Esperanto-Amika Rondo la geedzoj-Pásztor ricevis inviton al urbo Szolnok al decembra kunveno de la Amikeca Esperanto-Societo kaj al Budapeŝto al la Zamenhof-taga festo de HEA.
Ambaŭloke oni akceptis ilin volonte.

## Agado de la miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo en 2006

### Nova delegito de UEA en Miskolc

*De januaro 2006-a* s-ino Adrienne Pásztor estas individua membro de UEA kaj ankaŭ ano de HEA.
Ankaŭ László Pásztor estas ano de HEA, ĉi tiel la amika rondo havas reprezenton ĉe ambaŭ organizaĵoj.

### Helpoj al la retrevuo NHI

*De Februaro 2006* pro okulmalsano de d-ro Emeriko Ferenczy helpas d-ro Endre Dudich provizore en revizio de la retrevuo „Nordhungaria Informo.”
Sinjoro prezidanto de UEA Renato Corsetti metas nian grupon al la baqbiladlisto de Lokaj-esperanto-grupoj, por ke nia retrevuo ekhavu internacian legantaron. Vere okazis tiel.

### Prelego de vicprezidento de HEA, pieca vizito

*La 1-an de Marto 2006* d-ro Endre Dudich prelegis al la miŝkolcaj esperantistoj pri la situacio de HEA. Ĉeestis 16 geesperantistoj.

*En Marto* okazis florkronado ĉe la tombo de Julio Baghy, esperantista poeto en Budapeŝto en la Fiume-strata tomboĝardeno.

### En slovakia Eo-Kongreso kiel reprezentantoj de HEA

*En Majo de 2006* geedzoj-Pásztor partoprenis en reprezentado de HEA en Piestány en la slovaka jubilea Esperanto-Kongreso. Poste invitaj de Magdalena Feifičová, ĉefredaktistino de Esperantisto Slovaka ili ekkonis la ĉirkaŭaĵon de Žilina kaj faris vizitadon en Esperanto-klubo de Žilina, invite de Juraj Gondžur, prezidanto de la tiea klubo.

### Enlanda partopreno de Esperanto-aranĝaĵo, pieca vizito

*De la 30-a de junio ĝis la 1-a de Julio 2006* geedzoj Pásztor partoprenis en urbo Tokaj en la 39a Landa Amika Renkontiĝo de la Fervojistaj Esperantistoj. Ili informiĝis de s-ino Julio Várhelyi, iama Esperanton instruanta instruistino, ke kiel sekvo de la reĝimŝanĝo ankaŭ en Tokaj ĉesis instruado de la esperanta lingvo.

*En Aŭgusto 2006* la geedzoj faris vizitadon en Máriabesnyő ĉe la kripto de d-ro Kolomano Kalocsay, kie ili metis la florkronon de la amika rondo.

**Tago Ludoviko**

Okaze de la tago de Ludoviko, la 25-an de Aŭgusto la Amika Rondo florkronadis tombojn de Ludoviko Király kaj d-ro Ludoviko Győry Nagy kaj la Miŝkolcajn Esperanto-memorlokojn.

**Elekto de estraranoj de HEA**

*La 9-an de Septembro* kiel invititoj la geedzoj-Pásztor ĉeestis en la ĝenerala asembleo de HEA, kie d-ro Endre Dudich rezignis pri sia vicprezidanta ofico kaj estis elektita kiel honora prezidanto de HEA. Samtempe kaj samloke estis elektita prezidanto de HEA Jozefo Baksa kaj Jozefo Eszényi vicprezidanto de HEA.

**Miŝkolcanoj funebras**

*La 12-an de Septembro 2006* dum entombigo de Stefano Temesi, /82 jaraĝa/ iama eminenta fervojista esperantisto, individua membro kaj delegito de UEA, IFEF-ano, la misŝkolca redaktoro de la gazeto „Verda Vojo" de la fervojistaj esperantistoj de Budapeŝto. La ceremonion ĉeestis kaj fervojistaj kaj ne fervojistaj geesperantistoj de Miskolc entute 16 homoj krom la ceteraj funebrantoj.
La funebran paroladon diris lia iama laborkunulo kaj samideano, dro Jozefo Halász, alte taksante la signifon de la vivo de la mortinta esperantisto.

**Esperanto-ekspozicio el esperantaĵoj de Kolektaĵo de Karlo Fajszi**

*26an de Septembro*: la geesperartistoj de Miskolc partoprenis en la Landa Fremdlingva Biblioteko dum ties Malferma-tago, kie s-ino Helena Jozefo Böde kaj Anna Marosvőlgyi bibliotekistinoj organizis Esperanto-ekspozicion el esperantaĵoj de Karlo Fajszi.
Direktorino de la biblioteko promesis meti la printitan retrevuon „Nordhungaria Informo"-ankaŭ antaŭ la legantojn.

**Festo pri la 115a datreveno de naskiĝo de d-ro Kolomano Kalocsay en Abaújszántó**

*En oktobro de 2006,* la partoprenantoj festis en Abaújszántó la 115an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Kolomano Kalocsay, kie s-ino Adri Pásztor, alia Miŝkolca reprezentantino de UEA / unu estas d-ro Jozefo Halász / diris festan paroladon.
Florkronadoj okazis ĉe la Esperanto-memorlokoj en Abaújszántó. Ankaŭ s-ro Georgo Madár nova urbestro de Abaújszántó salutis la esperantistojn vizitantajn la urbon.

**Invitoj al esperantistaj eventoj**

*En Novembro 2006* Emeriko Cséti, fervojista esperantisto invitis la Amikan Rondon por viziti la klubkunvenon en Debrecen, sed neniu povis akcepti la inviton pro alia programo.

*La 16-an de Decembro*: partopreno en la Budapeŝta Zamenhof-festo. Partoprenis kaj geedzoj Pásztor kaj Maria Busai kaj Jozefo Dudás, kiu lasta fotis la eventojn por gardi ilin al estonto.

*La 17-an de Decembro*: ĉe la Zamenhof-strata memortabulo renovigita de la Amika Rondo okazis festo kaj florkronado. Ĉi tie László Pásztor diris festan paroladon. S-ino Adri Pásztor faris ceterajn anoncojn kaj deklamis la parafrazon „Verda lando”, kiun d-ro Endre Dudich skribis laŭ la poemo de Mikelo Babits „Nigra lando”.

## Agado de la Miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo en 2007

### Helpo de Biblioteko de UEA

En Januaro 2007 retroire registris „Hector Hodler” Centra Biblioteko de UEA retgazeton de la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo, same kiel la Cifereca Biblioteko de la Budapeŝta Biblioteko „Széchényi”.

### Honora florkronado

En Marto 2007 okazis florkronado ĉe la tombo de Julio Baghy en la Fiumei-strata tomboĝardeno.

### Ŝanĝiĝas la reviziantoj de la retrevuo NHI

De la 31-a de Marto 2007 d-ro Endre Dudich kaj d-ro Emeriko Ferenczy anoncis ne daŭrigi plu la konstantan reviziadon de la Nordhungaria Informo pro malbonstato de ilia sanstato. Pro tio apud Helena s-ino Fedor, Jozefo Cziboly faras la reviziadon. De tempo al tempo helpas en tiu ĉi laboro d-ro Emeriko Ferenczy kaj d-ro Andreo Dudich.

### Rete aperas versaj-fabeloj

De Marto 2007 en Budapeŝto en la Cifereca Biblioteko de la Landa „Széchényi” Biblioteko estas legeblaj poemaj rakontoj de Anna Fazekas, hungara verkistino,
- Kapreolido de olda onjo
- Kapreolavinjo.

Tiujn verkojn esperantigis s -ino Adri Pásztor kaj d-ro Endre Dudich.

### Urbestrara helpo

La Miŝkolca Városgazda Publikutila Societo laŭ permeso de la Urba Konsilantaro / je la peto de geedzoj-Pásztor / renovigis la du tabulojn „Esperanto-parko” /apud placo Sankta Anna / kaj la marmoran memortabulon de Esperanto, starigitan en 1957.

### Gastoj el Danio kaj Slovakio kaj esti gastoj en Slovakio

*La 3-an de Majo 2007* Betty Chatterjee, prezidantino de la Esperanto-klubo de Kopenhago faris viziton en Miskolc, kiu helpe de geedzoj Pásztor ekkonis Lillafüred-on kaj trutbredejon de Garadna, kie post la promenado ili tagmanĝis en la restoracio bakanta trutojn..

*En Majo de 2007* la geedzoj Pásztor ĉeestis en Martin en la Slovakia Esperanto-Kongreso, dum kiu oni festis 100an datrevenon de la Slovaka Esperanto-Movado. Post la kongreso Magdalena Feifičová gastigis la geedzojn Pásztor montrante al ili belecojn el ŝia patrujo urbon Žilina, ties ĉirkaŭaĵon kaj urbon Trenčin en Okcidenta Slovakio.

*En Junio de 2007* Magdalena Feifičová faris viziton en Miskolc, kiu helpe de geedzoj Pásztor ekkonis Miskolc-on kaj ties ĉirkaŭaĵon. Laŭ la lerta programo de geedzoj Pásztor, Magdalena-n gastigis la slovak-pola- … devena vilaĝestraro de Bükkszentkereszt. ŝi ricevis donace en memoron de ili ne nur prospekton, sed ankaŭ etan vitrovazon.

**Kalocsay festo en Abaújszántó kadre de Vinberrikoltaj Tagoj**

*La 22-an de Septembro* kadre de Vinber-rikoltaj Tagoj okazis en Abaújszántó rememoro okaze de 116a jardatreveno de la naskiĝo de d-ro Kolomano Kalocsay. Ĉeestis d-ro Ludoviko Molnár, prezidanto de la Budapeŝta UMEA-fakgrupo kun sia edzino, d-ino Juliana Farkas en reprezentado de HEA, Margareta Evva, lokhistoriisto de urbo Encs kaj László Szilvási, prezidanto de KEA krom la organizantaj geedzoj Pásztor kaj la geesperantidtoj de Abaújszántó.

**Esperanto-libro ekspozicio, akcepto de pola gasto**

Grava okazintaĵo de la jaro estis ekspozicio de Esperanto-libroj, eldonaĵoj en la Miskolc-a „LÉVAY, József" Kalvinana Gimnazio la *16-17-an de Oktobro*. La ekspozicion malfermis la geedzoj Jáky, kiuj estas posedantoj de la honora titolo „kavaliroj de kulturo kaj ambasadoroj de la paco". La ekspozicion rigardis 57 personoj, sed dum la semajno post la malfermo multe da homoj estis scivolaj pri la eksponitaj esperantaĵoj. Dum la tago de la ekspozicio Stanislaw Mandrak, eksprezidanto de la Pola Esperanto-Asocio prelegis pri la Pola Esperanto-Asocio, pri la Ĉeh-metodo kaj pri la sana vivo. La prelego estis lumbilde projekciata. Al la pola gasto la geedzoj Pásztor prezentis historiajn kaj naturajn valoraĵojn de Miskolc kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Al la 2007-a jaro ligiĝas ankaŭ unu petego sendita al la Urbestraro de Miŝkolco, en kiu s-ino Adrienne, Lászlóné Pásztor petis la Urbestraron, ke tiu nomu publikan areon pri nia estinta TEK prezidanto d-ro Ludoviko Győry Nagy. Je memoro de la sekvontjara (en 2008) 95-a datreveno de la ekirigo de lia unua esperantolingvoinstrua kurso, je honoro de lia kultura agado.

En 2007 nur en la bazlernejo Miŝkolca Komlós-montosupra estis Esperanto-instruado fare de Helena sinjorino Stefano Fedor. Ŝi instruas la lingvon Esperanto ankaŭ por plenkreskuloj. Ŝi estas reviziantino de la „Nordhungaria Informo."
Ankaŭ d-ro Jozefo Halász faras Esperanto-instruadon al plenkreskuloj en la Fervojista Kulturdomo de Miŝkolco.
Maria Busai, eksintruistino de4 Szirmabesenyő, same faras Esperanto-instruadon por plenkreskuloj.
Bedaŭrinde en ĉiuj lernejoj de BAZ-departemento ĉesis instruado de la lingvo internacia. Ĉi ties kaŭzo estas la reĝim-ŝanĝo, la senintereseco kaj maljuniĝo aŭ morto de la instruistoj.

*En Decembro 2007* florkronado okazis ĉe la marmora Esperanto-memortabulo el 1957 kaj ĉe la Zamenhof-strata memortabulo, okaze de la 120-jara datreveno de la naskiĝo de la Internacia lingvo-Esperanto.

# Agado de la miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo en 2008

## Novjaraj bondeziroj

*La 2-an de Januaro* la geedzoj-Pásztor el Miskolc kaj Teodor Andreas, reprezentanto de Esperanto de Košice salutis la novan jaron kaj deziris por Esperanto-movadanoj de ambaŭ landoj kaj de la mondaj multe da sukcesoj.

## Ĉu el unu estiĝis du?

*La 20-an de Februaro* Jozefo Bakŝa tiama prezidanto de HEA kaj Jozefo Dudáŝ (nia amikrondano) organizis rondtablan paroladon en iu miŝkolca kafejo. Tie duona membraro de nia Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” fondis novan esperanto grupon de HEA. Ties komisiita gvidanto estas s-ro Jozefo Dudáŝ. Pri ilia esperanto-movada agado kaj pri kunvenoj ni ne havas informojn, sed ties membraro escepte ties estron, ĉiam partoprenas la aranĝaĵojn de la EAR „Király Lajos”. La movadan kaj literaturan laboron de nia EAR, helpas 37 tiuj geesperantistoj el la mondo, kiuj estas membroj de aliaj eo-kluboj. Tiel estiĝis nia Esperanto-Amika Rondo vere Internacia. Ekde septembro de 2005 estas redaktata la revuo Nordhungaria Informo, en kiu movadaj, literaturaj kaj ceteraj temoj aperas.

## Gastigo de pola grupo en la Regiono Norda Hungarujo

*La 4-5-6-an de Aprilo* – ni povis akcepti 50 membran polan grupon (esperantistoj kaj ne esperantistoj kune. La grupő konatiĝis kun Miŝkolco kaj ties ĉirkaŭaĵo. Estrino de la grupo estis Halina Komár, prezidantino de la Pola Esperanto-Asocio. La renkontiĝo havis amikan etoson. La gastoj estis kontentaj. Ili ricevis esperantlingvajn kaj pollingvajn informilojn pri la vizititaj lokoj de Abaújszántó kaj Miŝkolco. Eĉ ili povis partopreni pollingvan meson en Miŝkolco.

La renkontiĝo estis ege bona propagando por Esperanto antaŭ la neesperantistoj. Al la organizado de la gastoakcepto donis altgradajn fakajn konsilojn kaj lingvan helpon D-ro Endre Dudich; honora membro de UEA. La neesperantistajn polajn gastojn pole salutis je la alveno kaj ĝis la fino ĉeestis D-ro Georgo Nanovfszky, la alia honora prezidanto de HEA. Pri la grandsukcesa renkonto aperis artikolo en la revuo ESPERANTO (organo de UEA), verkita de s-ino Halina Komar, prezidantino de PEA.

**Partopreno en Esperantista aranĝaĵo**

*La 27-28-29-an de Junio,* la geedzoj Pásztor partoprenis Rnkontiĝon de la Fervojista Esperanto Asocio, en la transdanuba urbo Tata. Dank' al la organizantoj la tuta programo estis eminenta. En la urbo tiutempe okazis la „Akvo-muziko-floro" festivalo. Partoprenis la renkontiĝon Ĉeĥoj, Poloj, Aŭstroj kaj Slovakoj. Malgranda urborigarda veturilo estis al dispono de la gastoj, pere de tiu la organizantoj prezentis interesaĵojn de la urbo. La koniga teksto estis esperantlingva. Ni vizitis ĉevalfarmon, arboreton, zooĝardenon, ĉaromuzeon de Bábolna. D-ro Jozefo Bacsárdi interpretis esperantlingve por la eksterlandanoj la hungarlingvan prezenton de la fremdulgvidanto. Inter la Ĉehoj estis sinjoro Jindrik Tomiŝek. Foje Adri Pásztor menciis, ke geedzoj Pásztor kaj li povus esti parencoj, se lia nomo estus Tomaŝek kian famili-nomon havis la patra avino de Adri Pásztor. Li respondis, ke iam lia familianomo estzis same Tomaŝek, nur ia ebria matrikulisto mis-skribis la nomon de la novnaskito, do ekde tiam la familianoj heredis la nomon Tomiŝek. Ekde aŭdo de la anekdoto Adri Pásztor ŝerceme diradas, ke en unu parencaro povas esti tri gesamideanoj. Unu en Ĉehujo tiu Tomiŝek, unu en la hungaria Békéscsaba (Karlo Ficker kiel patraflanka parenco de Adri Pásztor kaj mem Adri Pásztor.

Antaŭ la dormejo Esperanto-flago atentigis, ke en la urbo okazas Esperanto-aranĝaĵo.

**Partopreno de esperantlingva Festivalo en Szolnok**

*La 7-8-9-an de Julio,* dum aranĝo de IRIS en Szolnok la miŝkolcan Esperanto-Amikan Rondon reprezentis la geedzoj Pásztor. Bedaŭrinde el nia rondo aliuloj ne venis, kaj ni ne vidis tie eĉ sinjoron Jozefon Dudás el la alia miŝkolca grupo. Iu menciis, ke laŭ lia scio tiu grupo ne funkcias. Estis surpriza, sed ege agrabla, ke la hungaraj partoprenantoj nur esperantlingve paroladis, neniu uzis sian nacian lingvon, kvankam estis permesita. Unu el la plej interesaj programoj estis la Esperanto-kurso por komencantoj, kio okazis laŭ la Ĉeh-metodo. Ties instruisto estis sr-o Stanislaw Mandrak eksprezidanto de PEA, kiun pasintjare gastigis nia Amika Rondo. Li estas talenta pedagogo, kiu tre bone instruas.

En Szolnok estis interesa la ekspozicioj de la belartistoj, kie ni povis miri portreto-pentraĵon pri L.L.Zamenhof. Tie ni konatiĝis kun diversnaciaj esperantistoj: svisino, poloj, rumanianoj, serbino (Terezija Kapista).

**Esperanto Land-kongreso en Pollando**

*La 20-21-22-23-an de Aŭgusto* la geedzoj Pásztor partoprenis Esperanto-kongreson de PEA en urbo Łodz, kiun oni aranĝis okaze de la centjara datreveno de PEA. Post la malfermo kaj Esperanto-himno sekvis prelego pri la Pola Esperanto-Movado kaj pri organizo de la 2009-jara bjalistoka

Esperanto-Kongreso. Dum la kulturprogramo poemoj de J.Tuwim, pola poeto estis deklamitaj kaj prezentis sian programon la koruso EĤO. Vizito estis en la juda tombejo kaj sinagogo. Dum urborigardo ni rigardis la palacon de Edward Herbst kaj fabrikon de Lodwik Geyer, kio estas nun tekstilindustria muzeo. Vespera programo estis la koncerto de Feliks akompanate de piano. Tiun sekvis la BI-BA-BO ensemblo.

Estis interesa la Palaco de Poznanski kaj la Manufakturo, kie estis trovebla la Informa Stando pri Esperanto.

Estis esperantlingva meso en iu romkatolika preĝejo de Lodz.

Ni ĝuis kantojn de Zúza Kornicka per gitaro akompanate.

Estis speciala la koncerto de JOMO, kiu sole kantis, gitaris diversajn popolajn kantojn. Efike de tiu ankaŭ la partoprenantoj komencis danci.

Nia sampatrujanino Doktorino Ilona Koutny raportis ege detale pri la instruado de Esperanto, kiu daŭras en Universitato „Adam Miczkievicz" de urbo Poznan.

Ni tre ege povis ĝoji, ke ni festis kune kun niaj polaj geamikoj la 100-an datrevenon de la Pola Esperanto-Asocio.

**Festo de la esperanto-agado nia-regiona kaj cent jariĝo de esto de UEA**

*La 17-an de Septembro* estis inaŭgurita Esperanto-libroekspozicio, el tiu okazo, ke ĉi-jare 100-jara estas UEA, 95-jara estas la miŝkolca Esperanto-Movado (lingvoinstruo), kaj 25-jara estas la Memorĉambro de D-ro Kolomano Kalocsay en urbo Abaujszántó. Loko de la esperanto-libro-ekspozicio estis la miŝkolca „II.Rákóczi, Ferenc" Departamenta Biblioteko. La ekspozicion inaŭguris D-ro Georgo Nanovfszky. Kun li kaj kun s-ino Adri Pásztor, la Miŝkolca Urba Televido faris intervjuon, kiun samtage oni prezentis al la estimata publiko. Al la ekspozicio certigis materialon: UEA, László Gadoŝ, Landa Fremdlingva Biblioteko- el la Kolekto „Fajszy", Eŭgeno Jóŝvai kaj geedzoj Pásztor. Partoprenis la ekspozicion ankaŭ D-ro Árpád Máthé, estrarano de Kalocsay-Societo, kaj Ilona Böde kiel reprezentantino de la Landa Fremdlingva Biblioteko, same el Budapeŝto.

**Publikarea nomtabulo pri esperantisto**

Ĉi-jare ni havis agrablan surprizon, ĉar nian peton plenumis la Urbestraro de Miŝkolco, ke estu prinomita iu Avaŝ-monta ŝtuparo en Miŝkolco pri D-ro Ludoviko Győry Nagy, amiko de D-ro Kolomano Kalocsay. Ĉi tiel la ŝtuparo apud la pordego de Reformata Tombejo sur monto Avaŝ, ricevis nomon de la menciita esperantisto, kiu estis estro, prezidanto de la miŝkolca kaj Borŝod-Abauj-Zemplén Departamenta Esperanto-Komitato de jaro 1960 ĝis 1980, ĝis lia morto. Li ripozas en la menciita kalvinana tombejo.

**Propagando por Esperanto**

*La 20-an de Septembro* en vilaĝo Tállya okazis Renkontiĝo de la hungarlandaj Popolkantogrupoj. Tiun partoprenis korusoj de Sellye, Zalakomár, Pálháza, Abaujszántó, Nyirlugos kaj Érpatak. Ĉi tie ni spertis, ke inter la partoprenantoj de la renkontiĝo estas tre granda la kuntena forto. Ĉi tiu devas esti por ĉiuj societoj bona ekzemplo, ĉar ĉiuj povas atingi rezulton, nur pere de komuna, malegoisma laboro. Sinjoro László Pásztor esperantlingve salutis la alvenintojn. Kvankam la grupoj ne konis Esperanton, tamen bonkore akceptis la saluton kaj dankis.

**Festa aranĝaĵo okaze de 25-jariĝo de la Memorĉambro pri D-ro Kolomano Kalocsay en urbo Abaujszántó**

*La 27-an de Septembro* okazis kadre de la Vinrikoltaj Tagoj de Abaujszántó festo de 25-a datreveno de Memorĉambro de D-ro Kolomano Kalocsay. La urbestro Georgo Madár, Lászlóné Pásztor kaj Jozefo Eszényi salutis la ĉeestantojn, poste Stefano Nagy popolkantisto kantis du muzikigitajn poemojn de Aleksandro Petőfi, hungara poeto, kiujn tradukis D-ro Kolomano Kalocsay. El Abaújszántó, kvar lernantinoj - de la instruistino Ildiko Széphalmi - esperantlingve deklamis du versajn fabelojn de D-ro K. Kalocsay ĉe busto de li. Samideano Attila Makay el Nagyvárad (Oradea) diris siajn pensojn en la strateto de D-ro Kálmán Kalocsay kaj deklamis Dojno titolan poemon de Mihail Eminescu: rumana poeto, laŭ traduko de D-ro Kalocsay.

En la tombejo de Abaujszántó s-ino Adrienne Pásztor deklamis modernan varianton de la bela preĝo Patro nia, esperantigita de D-ro Andreo Dudich, ĉe tombo de patrino de D-ro Kolomano Kalocsay

**En 2005-2008, en Miskolc daŭre instruatas Esperanto**

Sinjorino Maria Busai, Helena s-ino Stefano Fedor, D-ro Jozefo Halász, Ladislao Kövér, sinjorino László Szmetankó. Ili partoprenas kune kun iliaj gelernantinoj niajn festajn aranĝaĵojn.

## Historio de la Esperanto Movado en Miskolc
## 2009

### Karnavala balo kun ioma Esperanto

La 7-an de Februaro la „Kővirág” popolkantkoruso de Tállya invitis la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondon por festi karnavalan balon en vilaĝo Tállya. László Pásztor esperantlingve salutis la ĉeestantojn, poste ankaŭ hungare. La menciita ensemblo certigis riĉan programon por la partoprenintoj. Dum la vespero kantoj kaj gajaj scenaĵoj sekvis unu la alian. S-ino Adri Pásztor kantis esperantlingve hungaran popolkanton. Oni miris, ke la esperantlingva kanto same bela estas, kiel la hungarlingva. La etoso estis bona, dank’ al la ĉeforganizanto: sinjorino Ferenc Kalina, kiu estas gvidantino de la „Kővirág” popolkantkoruso de Tállya.

### Membriĝo ĉe Societo Kálmán Kalocsay

La 28-an de Februaro la geedzoj Pásztor partoprenis kunvenon de „Amika Societo D-ro Kolomano Kalocsay”. Nun tiu ĉi societo havas 31 enlandajn kaj 17 eksterlandajn membrojn. Bedaŭrinde nur 9 membroj /kune kun ni/ partoprenis ĉi tiun kunvenon. Pro forlaso de Ada Csíszár estis elektita D-ro Árpád Máthé kiel prezidanto provizore, kiu estis pli frue sekretario de la societo. László Szilvási proponis vizitadojn al tombejo de Mariabesnyő kaj prizorgadon de la kripto Vrangel. Adri Pásztor atentigis la ĉeestantojn, ke la kripto estas malmoderna kaj la forŝtelistoj povas forrabi la reliefon de D-ro K. Kalocsay. László Pásztor proponis plantadon de floroj ĉirkaŭ la kripton. La „Amika Societo D-ro K.Kalocsay” fondiĝis la 30-an de novembro 1991, por honoro al la renoma medicinisto kaj klasikulo de Esperanto-kulturo.

### Partopreno de festa inaŭguro

La 13-an de Marto 2009a en Eger en „Bartakovics Béla” Közösségi Ház (Komunuma domo) okazis festa inaŭguro de memortabulo de D-ro Gabrielo Bálint, universitata profesoro de Kolozsvár /nun Cluj en Rumanio/. La inaŭguro de memortabulo okazis de organizadoj de kultura kaj arta centro de Eger kaj en „Verda stelo” Esperanto klubo de Eger. D-ro Gabrielo Bálint estis la unu hungara esperantisto. Jozefo Eszényi, estrarano de HEA diris inaŭguran paroladon. La memortabulon faris Roberto Nagy. Sur la marmortabulo estas gravurite portreto kaj nomo de D-ro Gabrielo Bálint kaj la sekva teksto: „La unua hungara esperantisto.”

### Printempa vento akvon inundas, bona ago saman agon altiras

La 25-an de Aprilo la geedzoj Pásztor faris printempajn laborojn en kalvinana tombejo ĉe familia kripto de Ludoviko Győry Nagy. Ili plantis pinarbeton kaj forigis la sekajn arbofoliojn. Samtage Tibor Ábrám direktoro de la Kalvinana Gimnazio „Lévay József", anoncis, ke la gimnazio farigos memortabulon sur la ternivela parto de la gimnazio, je honoro d-ro L.Győry Nagy kaj d-ro K. Kalocsay, iamaj disĉiploj. Al la kostoj Adri Pásztor subvenciis 22000.- forintojn.

**Esperantisto el Ózd**

La 29-an de Aprilo esperantisto de Ózd, Jozefo Gulyás vizitis nian Esperanto-Amikan Rondon en la klubejo. Dum parolado li diris, ke klubvivo ne ekzistas en Ózd, sed kontraŭe, antaŭ la reĝimŝanĝo la Esperanto-klubvivo estis vigla. Li legas interesante nian revuon, la Nordhungarian Informon.

**Vizito en Francujo**

*Inter 30 de Junio kaj 13. de Julio* la geedzoj Pásztor faris vizitadon en Francio ĉe kuzino de László Pásztor. Ŝi studis Esperanton en Ĉeflernejo de Temesvár /nuna Timiŝoara en Rumanio./ Ŝia instruisto estis Ignatio Bociort. Ni ekkonis pere de ŝi vivon de la franca popolo kaj la landon de Parizo ĝis la Monto Blanka en Alpoj. Foj-foje estis trovitaj homoj kiuj lernis iam Esperanton sed jam ne okupiĝis pri ĝi. Ili mire rigardis nin Hungarojn fore de nia lando kaj ĝoje aplikis sian Esperanto-lingvo scion por paroladi pri la ne bonaj efikoj de la klimatoŝanĝiĝo ankaŭ en Francujo.

**Universala Kongreso en Bjalistoko**

*De 25 de Julio ĝis 1. de Aŭgusto* okazis la 94. Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en la pola urbo Bjalistoko. El Hungario partoprenis tiun 28 gehungaroj, inter tiuj estis la Miŝkolcaj geedzoj Pásztor, kiuj partoprenis ankaŭ kunvenon de la ĵurnalistoj, dum kiu Adri Pásztor estiĝis membro de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista-Asocio) akceptita mem de prezidanto de TEĴA, post lia enrigardo en la retrevuon Nordhungaria Informo. Tiu kongreso estis aranĝita okaze de 150. naskiĝtago de kreinto de Esperanto, L.L.Zamenhof. Dum la kongreso okazis multe da prelegoj, koncertoj, teatraj, filmaj kaj pupteatraj spektakloj inter multaj aliaj. Estis neforgesebla prezentado de filmo, farite laŭ la romano: Sinjoro Tadeo de Adam Miczkiewicz. Andrzej Vajda reĝisoris la filmon, la paroltekstojn esperantigis Roman Dobrzynski. Poste geedzoj Pásztor inter la EAR-rondanoj raportis pri la evento.

**Profesoro István SZERDAHELYI, kaj profesorino Ilona KOUTNY**

La 30-an de Aŭgusto okazis en Budapeŝto memorfesto de d-ro prof. Stefano Szerdahelyi. La memorfesto okazis ĉe ĉeesto de familianoj de doktoro Strefano Szerdahelyi. La feston direktis D-ino Helena Koutny, eksdisĉiplino de d-ro Stefano Szerdahelyi kaj eksinstruistino de ELTE /Sciencuniversitato ELTE/. Nuntempe ŝi vivas en urbo Poznan kaj instruas Esperanton en la „Adam Miczkievicz" Universitato. Helena Koutny prezentis verkaron de S. Szerdahelyi kaj konigis la memorlibron" Abunda fonto." Iu filo de Szerdahelyi vivas en Japanio kaj kunportis esperantistajn japanajn infanojn, kiuj estas liaj disĉiploj. Lernolibrojn de Szerdahelyi oni ankaŭ nun uzas en Esperanto-kursoj. La festo okazis je estimo de 85. datreveno de naskiĝo de d-ro Stefano Szerdahelyi. La eventon partoprenis membroj de la EAR: Ildiko Király sinjorino D-ro Wu, kaj geedzoj Pásztor.

**Vizito en Muzeo de la Hungara Lingvo**

Septembre la geedzoj Pásztor faris viziton en Széphalom, kie rigardis maŭzoleon de Ferenc Kazinczy, fama hungara lingvo-renoviganto, kaj la apud ĝi estantan domon de hungara lingvo. Ili metis florkronojn nome de la EAR „Király, Lajos" en la maŭzoleon kaj al statuo de Sofia Török, edzino de Ferenc Kazinczy kaj al tombo de Ferenc Kazinczy.

**Florkronigo en Máriabesnyő**

Antaŭ 118 jaroj naskiĝis kaj antaŭ 33 jaroj mortis D-ro Kolomano Kalocsay. Okaze de tiuj eventoj en oktobro la geedzoj Pásztor metis florkronojn en Abaujszántó ĉe memorlokoj de D-ro Kalocsay kaj ĉe kripto de familio Vrangel en Máriabesnyő. Ĉirkaŭ la kripto ili forigis la sekajn foliarojn kaj antaŭ la kripton plantis florojn. Ĉe ambaŭ lokoj ili bruligis kandelojn de la memoro.

**En Miskolc bazlerneja Comenius projekto pri Esperanto, helpe de EU**

La 18-an de Oktobro kadre de la „Comenius" projekto la bazlernejo de Miskolc-Komlóstető gastadis germanajn esperantistajn gelernantojn de Herzberg kaj de iu Angluja lernejo. En 2008. la hungaraj kaj germanaj gelernantoj gastadis en Anglujo, kaj en 2010 lernejo de Herzberg gastigadis la hungarajn kaj anglajn gelernantojn. D-ino Farkas Éva Kares, direktorino, kaj Helena Fedor instruistino prizorgis la riĉan programon. La hungaraj esperantistaj infanoj prezentis inter aliaj la „Matjo ansera" titolan fabel-ludon, verkon de Mikelo Fazekaŝ, hungara verkisto. Post prezentadoj de la tri lernejoj okazis komuna danco /gastoj, gepatroj, infanoj/ kaj poste okazis komuna parolado. Ĉeestis sume 100 personoj. Geedzoj raportis pri la okazintaĵo en la Nordhungaria Informo.

**Kunveno de japanmetode kurac-gimnastikigistoj**

La 24-an de Oktobro okazis kunsido de Yumeiho en klubejo de „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo. La kunsidon direktis Katarina Farago el urbo Hódmezővásárhely. Dum la kunsido temis pri mesaĝterapio, kaj plano por aranĝi Medicinan Esperanto-Kongreson en 2010. kaj Yumeiho organizaĵon.

**Zamenhof-tago en Miskolc**

La 15-an de Decembro okazis ĉe la Miŝkolca Zamenfof-memortabulo memorfesto okaze de 150. datreveno de naskiĝo de kreinto de Esperanto, L.L.Zamenhof. Adri Pásztor diris festan parolon primemorante pri meritoj de L.L.Zamenhof. Poste la ĉeestantoj / 6 personoj/ metis florkronojn al la memortabulo. Ankaŭ d-ro Jozefo Halász surmetis florkronon nome de la fervojistaj geesperantistoj. La etoso estis familia.

**Denove ni estas malpli**

Malgaja okazintaĵo okazis decembre. Barnabo Batta, eminentulo de la hungarlanda esperanto-movado mortis dum la duatago de kristnasko. Li faris movadan laboron de 1978. ĝis 1990, kiel prezidantoj de BAZ-Departamenta Esperanto Komitato kaj de „Ora Duopo Kalocsay-Baghy”, vicprezidanto de „Societo Kalocsay”. Li nomigis straton pri K. Kalocsay en urbo Miskolc, kaj metis memortabulon sur unu domon en la strato d-ro Kolomano Kalocsay. Li organizis ekskurson okaze de 1983. jara Universala Kongreso de Esperanto. Li estigis memorlokojn al D-ro K. Kalocsay en Abaujszántó. Li organizis en Miskolc en 1988. Landan Esperanto-Renkontiĝon. En Miskolc, li farigis kaj metis memor-marmortabulon en strato Zamenhof en 1988. Je estimo de Barnabo Batta, la adiaŭa ceremonio antaŭ la entombigo okazis en la Miŝkolca tombejo de Szentpéteri-kapu. Sinjorino Adrienne Pásztor prezentis la funebran parolon (je la 5a de januaro 2010a) enfazante la personecon, la vivovojon kaj esperantistan agadon de la mortinto.

Pri la 2009. jara nia agado ni raportis en la ceteraj numeroj de la reterevuo Nordhungaria Informo.

## Historio de la Esperanto-movado en Miskolc
## 2010

### Novjara honordona saluto

Novjara saluto alvenis de sinjorino Barbara Pietrzak, ĝenerala sekretario de UEA.

### Promeso, ke en hungaringvaj akmanakoj aperos ankaŭ esperantlingvaj verkoj

La 23-an de Aprilo la Societo de Tokajmontosubaj Artkreantoj aranĝis la kutiman jaran ĝeneralan kunsidon en urbo Szerencs en kazinejo de fortikaĵo Rákóczi. Ankaŭ ni, la geedzoj Pásztor partoprenis tiun kiel novaj membroj. D-ro Ernesto Gaál prezidanto (iam lerninta Esperanton en Füzesabony) raportis pri laboro de jaro 2009. Geedzoj Pásztor proponis por sendi prozaĵojn al la societo ankaŭ esperantlingve. La proponon ĉiuj partoprenantoj akceptis ĝoje. Ĉar 2010 estas jaro de Stefano Széchenyi, pro tio la Reta Societo de Hungaraj Verkantoj konkurson anoncis, kies temo estis: „Alte taksita pasinto." Ankaŭ Adri Pásztor promesis sendi konkursaĵon.

### Forpasis doktoro Ferenc Jáki

Malgaja okazintaĵo okazis la 26-an de Marto. La grandestimata kara samideano, amiko, D-ro Francisko Jáki mortis. Li estis emerita mezlerneja instruisto kaj doktoro pri klasika filologio. Li lernis Esperanton en kurso de Julio Baghy en 1961, li diplomiĝis en 1965 kiel esperanto-instruisto. Li kune kun prof, Stefano Szerdahelyi iniciatis la leĝigon de elektebleco de Esperanto kiel studobjekto en la hungaraj lernejoj kaj starigon de ŝtata ekzamenkomitato, en kiu li membris, funkciante delonge kiel ĝia prezidanto. De 1966 ĝis 1969 li kunlaboris kiel arta tradukisto kaj voĉleganto de la Esperanto-elsendo de Hungara Radio. Dum pluraj mandatperiodoj li estis komitatano kaj estrarano de HEA, kies honora membro li iĝis. Li estis elektita honora membro de UEA en 1999. Li estis distingita kiel Kavaliro de Hungara Kulturo. Li aperigis plurajn poemojn kaj hungare kaj esperante. Li skulptis, pentris, fotis. Li estis membro de Societo de Tokajmontosubaj Artkreantoj, en ties antologioj liaj pluraj poemoj aperis. Li malfermis la Esperanto-ekspozicion la 15-an de oktobro 2007, kiun aranĝis la geedzoj Pásztor en la Miŝkolca Gimnazio „Lévay József". Lia adiaŭigo okazis la 9-an de Aprilo 2010 Érd-Felső, en la tiea romkatolika preĝejo. Liajn cindrojn oni ŝutis ĉe insulo Csepel en riveron Danubo en ĉeesto de la familianoj. Ni gardas lian memoron poreterne!

**Komuna festado de cent jariĝo de Esperanto-movado en Oradea, Rumanio**

La 7-8-9-an de Majo en Nagyvárad /nun la rumania Oradea/ Esperanto-kongreso okazis okaze de 100. jara jubileo de Esperanto-klubo de Oradea. El tiu ĉi okazo la geedzoj Pásztor ricevis inviton kaj reprezentis la Miŝkolcan „Király Lajos" Esperanto-Amikan Rondon. Ernesto Könczöl ĉeestis el urbo Eger kaj Emeriko Cséti el urbo Debrecen. La kongreson prezidis Stefano Budaházy, eksprezidanto de Esperanto-klubo de Oradea. Atilo Makkay, la prezidanto faris la organizajn taskojn. Li akompanis la gesinjorojn Pásztor kaj la aliajn al la dormejo, al la Reformata Eklezia Centro „Suzana Lórántffy". Prelegojn ni povis aŭskulti pri la rumana esperanto-movado, fare de Aurora Bute kaj Jozefo E. Nagy, kiuj redaktas la kvaronjaran Esperanto-gazeton. /ES-TO/. En la urba biblioteko la organizantoj prezentis helpe de ekspozicio dokumentojn de la pasintaj 100 jaroj. Ni partoprenis urbrigardon. Ni povis vidi la Ŝtatan Teatron, la antaŭ ĝi starantan statuon de Ede Szigligeti. Ni vidis statuojn de la elstaruloj de rumana popolko: Eminescu kaj Vulcan. Lastatage ni rigardis la fortikaĵon de la hungara reĝo Ladislao la Sankta en Oradea, konstruita sur bordoj de rivero Rapida Kőrös. La kongreso estis familioetosa, ni akiris novajn amikojn kaj renkontis malnovajn konatojn.

**Ĉeesto de Miŝkolcanoj en urbo Pécs**

La 2-4-an de Julio okazis la 42. Landa Fervojista Amika Esperanto-Renkontiĝo en urbo Pécs. Geedzoj Pásztor partoprenis tiun, reprezentante la Miŝkolcan „Király Lajos" Esperanto-Amikan Rondon. Bedaŭrinde Emerigo Szabó, prezidanto de HEA ne ĉeestis, la ĉefdelegitino samideanino Elizabeta Ködmön salutis la ĉeestantojn nome de HEA. Vendrede al Palkonya ekskurso, poste komuna vespermanĝo kaj vingustumado okazis. Samtempe estis alia ekskurso. Sabate estis urbrigardado en Pécs / Baziliko, maŭzoleo prakristana tombejo./ Esperantlingva sankta meso estis en moskeo de Ghazi Kaszim. Posttagmeze florkronado estis en Esperanto-parko, kie la ĉeestantoj florkronis memortabulon de D-ro Stefano Bácskai. Inter aliaj ankaŭ la geedzoj Pásztor metis florkronon nome de la miŝkolca „Király Lajos" Esperanto-Amika Rondo. Post la florkronado laborkunsido estis, dum tio estis libera diskutado pri la Esperanto-movado kaj diplomon ricevis tiuj, kiuj financis farigon de la memortabulo. Dimanĉe denove estis urbrigardo /moskeo Jakovali Hasszán, Palaco de Poŝto kaj Trilogio de M. Munkacsy./

**Partopreno de Kongreso de IMEK en Hódmezővásárhely**

*La 3-8-an de Julio* okazis la 17a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso /IMEK/ en urboj Hódmezővásárhely kaj Szeged. Samideanino Kata Faragó invitis la geedzojn Pásztor por partopreni la kongreson, poste skribi pri tio. Sciencaj prelegoj pri terapioj kontraŭ la tumoroj, la medicina sociala zorga sistemo kaj rolo de kuracplantoj en la medicina terapio. Ekspozicio estis pri pentraĵoj de sinjorino Maria Kalvai - Szente Varga pentristoj kaj pri keramikaĵoj de Garai. Estis prezento de Yumeiho pri terapio kaj jogo, naturaj kuracmetodoj, farmaciaj

esploraj rezultoj, fizioterapio, kuracmetodo de vertebraj malsantipoj, terapiaj kuracmetodoj. Urbrigardo estis en Szeged. Estis Yumeiho sekcio /ekzercoj, preparigo al la ekzameno/. Estis teatra prezentado de Georgo Handzlik. Ekskurso estis al Ópusztaszer, al la Nacia Historia Memorparko. Poste sekvis Yumeiho-ekzameno. En urbo Hódmezővásárhely estis urborigardo. La programoj estis variaj kaj riĉenhavaj.

Dum la UK en Havano (en Kubo), el la Kongresa Kuruero kaj Radio Havano ni eksciis, ke sinjorino Adrienne Pásztor gajnis premion - Honora Mencio - pro la de ŝi verkita teatraĵo Princino Ŝeka Dizabeti, (verkita laŭ temo kaj permeso de fraŭlino Nelly Masemi Mmbembi el Kinshasa, Demokratia Kongo). Bedaŭrinde la Beletra Almanako de UEA ne komunikis ĝin ĉar ne estis ĝi inter la I-II.III-aj premiitaj verkoj. Sed kiuj legis ĝin, ĉe tiuj gajnis plaĉon la Afriko-tema verko, kaj tiuj samideanoj oppiniis, ke eble ekiros pere de ĝi la Afrika-Esperanto-lingva teatra ludado.

**Transdono de heredaĵoj al Biblioteko en Abaujszántó**

La 6-an de Oktobro la geedzoj-Pásztor faris piecan vizitadon en Abaujszántó ĉe memorlokoj de D-ro Kolomano Kalocsay. Ili transdonos al S-ino Imola Széphalmi Burkus unu reliefon de D-ro Kolomano Kalocsay kaj kelkajn Esperanto revuojn el materialoj de Barnabo Batta. Geedzoj Pásztor kaj Imola Széphalmi Burkus metis florkronon ĉe busto de D-ro Kolomano Kalocsay kaj ĉe strateto de D-ro Kolomano Kalocsay. Poste ili metis florkronon en tombo de Abaujszántó ĉe patrino de D-ro Kolomano Kalocsay. Ĉe ambaŭ tri lokoj ili bruligis meĉon kiel signo de la rememorado.

**Piecaj vizitoj ĉe tomboj de K. Kalocsay kaj de d-ro luzdoviko Győry Nagy**

La geedzoj Pásztor la 10-an de oktobro faris piecan vizitadon ankaŭ en tombejo de Máriabesnyő ĉe la kripto de familio-Vrangel, kie ripozas D-ro Kolomano Kalocsay. Ili faris aŭtunan purigadon ĉirkaŭ la kripto. Poste ili metis sian florkronon sub la memortabulo sur la muro. Fine ili ekbruligis la meĉujon, rememorinte je la elstara genia esperantisto.

La 17-an de Oktobro la geedzoj Pásztor faris aŭtunan purigadon en la miŝkolca Avaŝ-monta reformata tombejo ĉirkaŭ la kripto de la familio Győry Nagy. Ili metis florkronon ankaŭ sur lian tombon kaj ekbruligis meĉon, rememorante je la departementa Esperanto-Komitata prezidanto, D-ro Ludoviko Győry Nagy /li forpasis antaŭ 30 jaroj/. Li faris multe por tio, ke la esperanta lingvo estu akceptata kaj instruata en la bazaj kaj mezaj lernejoj.

**Esperantlingva rakonto en hungarlingva antologio**

La 18an de Novembro 2010 la Societo de Tokajmontosubaj Artkreantoj kaj La Societo de Retaj Verkantoj, aranĝis libroprezenton de sia antologio, en urbo Szerencs. En la antologio

nun ankaŭ esperantlingve aperis rakonto, por reklami Esperanton. En la „Megbecsült Múlt”(La altestimata Pasinto) titola antologio, la titolo de la aperinta rakonto estas: Macska bánat, Macska bú /Kata ĝojo, kata malgajeco/. La libroprezenton partoprenis ankaŭ sinjorino Anna Bartek (Anjo), kiel reprezentantino de la Hungarlanda Esperanto-Asocio.

**Zamenhof-taga rememoro**

Lasta aranĝaĵo de la jaro estis la florkronado de memortabulo de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de Esperanto en la strato Zamenhof la 15-an de decembro, de la 15a horo. Okaze de tio ni rememoris pri kreinto de Esperanto; D-ro L.L.Zamenhof. Tie la gepartoprenantoj deziris unu al alia agrablan kristnaskon kaj feliĉan novan jaron.

## Historio de la Esperanto-movado en Miskolc
## 2011

La *11-an de Februaro* okazis prelego de D-ro Tibor Elekes pri Transilvanio: kadre de „Viviga animo” Literatura Rondo. Ĉeestis ĝin la membroj de la Esperanto-Amika Rondo.

### Rememoro pri Julio Baghy kaj pri cent jariĝo de la pola esperanto-movado

En *Marto de la jaro 2011a*, geedzoj Pásztor kaj s-ino Judit Virányi metis florkronon sur tombon de Julio Baghy okaze de lia 2011. jara naskiĝtago.

*De la 30-a de Aprilo ĝis 7-a de Majo* okazis la 32. Pollanda Esperanto - Kongreso en Nowy-Sącz. Pro sanaj kaj ceteraj trafikaj problemoj ni povis raporti pri la okazintaĵoj nur pere de prospektoj.

### Kunsido de HEA, kaj nia malnova-nova membro

*La 21-an de Majo* okazis la jara kunsido de HEA. Tie temis inter ceteraj, ke laŭ permeso de HEA sinjorino Parkánski rajtas esti denove la membro de la EAR Király Lajos, - ĉar la HEA-grupo kreita de Jozefo Baksa kaj estrita de la miŝkolca samideano Jozefo Dudás - ne funkcias, eĉ faras nenion.

### Hungarigo de grava verko, tamen ne aperigebla

*La 21-an de Majo* la geedzoj Pásztor sciiĝis, ke la Miŝkolca esperantisto sinjoro Johano Orosz (nia eksa samgrupano) hungarigis elesperantigite libron de angla verkistino Marjorie Boulton pri Vivo de Zamenhof, sed pro manko de ŝia aperigpermeso, ĝin la „Amikeco” Esperanto-Asocio de Szolnok ne povas eldoni. La hungarigon reviziis: la Esperanto-klubestraranoj en Szolnok, Ernő Könczöl el Eger kaj Katalin Kováts en Nederlando. Ni bedaŭras, ke ili multege laboris kaj sensukcese.

### UK en Kopenhago kaj belarta sukceso

*Jam dum la UK en Kopenhago* (Danio) ni eksciis, ke sinjorino Adrienne Pásztor membro de la EAR „Király Lajos” estis premiita per la diplomo Honora Mencio, de la Belartaj Konkursoj de UEA. La Kongresa Kurirero portis la novaĵon. Ŝi konkursis per eseo titolita: Tutmondaj

defioj de la klimatoŝanĝiĝo”. Poste la eseon ŝi aperigis rete en la retrevuo Nordhungaria Informo, kaj presíte ĝi aperis en la gazeto Kroata Esperantisto.

**Vizito de tri urboj por konigi ilin esperantlingve**

*En Julio* la geedzoj Pásztor vizitis tri urbojn. En Gyöngyös ili faris viziton en kastelo Orczy, kiu staras en bela angla parko. En la kastelo ni rigardis ekspozicion de faŭno kaj flaŭro de Hungario kaj tre riĉhavan geologian ekspozicion. En urbo Hatvan ni rigardis bildo- kaj pentraĵekspozicion. En Nyiregyháza ni admiris la besto-ĝardenon. Krome en la menciitaj urboj ni faris urbrigardadajn promenojn kaj pri la vidindaĵoj artikoloj naskiĝis en la NHI: Informilo de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”.

*En aŭgusto* la ĝemelurbajn kontaktojn fortigante la geedzoj Pásztor faris urbrigardadan promenon en la slovakia urbo Koŝice. Tie Teodor Andreas, nia samideano kaj lia edzino estis la ge-fremdulgvidantoj. La memordomo „Rodoŝto” de Ferenc Rákóczi la 2-a, krome tri aliaj muzeoj (karcermuzeo, trafika- kaj komunikada) rolis en la tiea programo. Post la dumtaga irado en la tuttaga pluvado ni refreŝigis nin per bongustaj manĝaĵoj kaj biero, vivigante la slovakan-hungaran-esperantistan ĝemelurban kaj amikajn kontaktojn..

**120 jara estas Kolomano Kalocsay**!

*La 6-an de oktobro en* Abaújszntó estis pretigita korvarmiga, kortuŝiga festeno, kie ni rememoris pri 120. naskiĝtago de D-ro Kolomano Kalocsay. Proksimume 60 personoj ĉeestis tiun, krome multe da homoj sendis salutmasaĝojn, salutante la feston, organizantojn kaj la ĉeestantojn. Esperanto-kantojn kantis Anjo Amika, flutis Stefano Ringer, hungarajn popolkantojn kantis Stafano Nagy kaj la gelernantoj belege deklamis tri fabelojn de doktoro Kálmán Kalocsay. Ni rememoris pri Jolano Panda, patrino de D-ro Kolomano Kalocsay, kiu mortis pro malsano de cerbo-inflamo tuj post nasko.

**Partopreno de Landa Esperanto Kongreso en urbo Szolnok kaj librodonaco**

*La 3 – 6 –an de Novembro* okazis kun ĉeestoj de la geedzoj Pásztor kaj sinjoro Jozefo Dudás la Hungaria Esperanto Landa Kongreso en urbo Szolnok. Jozefo Eszényi aprecis meritojn de D-ro Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy. Sinjorino Mendel kaj fraŭlino Aniko Nemes raportis pri laboro de la Fremdlingva Biblioteko de Budapeŝto. D-ro Andreo Dudich prelegis pri geologia temo, krome prezentis doktoron Haszpra kiu prezentis sian tradukaĵon specialmaniere esperantigitan. En la esperantigita romano de Maŭricio Jókai: „La nigraj diamantoj”, sinjoro Haszpra aplikis ne Zamenhofajn ĉapelitajn literojn, sed anstataŭigis ilin per aliaj literoj. Geesperantistoj de Tata prezentis proprajn pentraĵojn. Ankaŭ urborigardado okazis en Szolnok kaj aĉeto de libroj krom la aliaj prelegoj kaj ceteraj okazintaĵoj.

Donace geedzoj Pásztor kunportis kofron plenan per vendeblaj libroj el ilia esperanjtolingva libro kolektaĵo kaj diversajn prospektojn krom revuoj.

**Peto kaj plenumo pri remeto de publikareaj nomtabuloj de la Parko-Esperanto**

Dum la tuta 2011-a jaro okazis la renovigo de la tramvojo de Miskolc tiel, ke oni pretigis ne nur la ŝoseojn apud la tramaj reloj, sed ankaŭ tiujn kaj oni ŝanĝis al novaj ankaŭ la kolonojn tenataj la kablojn kaj la strato-lumigilojn. Geedzoj Pásztor rimarkis, ke la nomtabulojn de Esperanto-parko oni ne remetis post la pretigo de la tuta projekto „Verda Sago" (Zöld Nyíl). Sinjorino Adrienne László Pásztor peticiis kaj de la urbestraro kaj de la gvidanta direktoro de la menciita projekto, la remetojn de la publikareaj nomtabuloj. Ĉar tiuj estis jam forĵetitaj dume, la projekt-estro refarigis kaj remetigis ilin al tri lampotenigaj kolonoj. La peticianto poste dankis ilian agon.

**Zamenhof-tago**

*La 15-an de Decembro* ni festis la 152-an naskiĝtagon de L.L. Zamenhof. El tiu ĉi okazo membroj de la amika rondo metis florkronon al memortabulo sur la strato Zamenhof.

## Historio de la Esperanto-movado en Miskolc
## 2012

### Funebro - dokumentoj en Arkivejo

*La 14-an de Aŭgusto en 2012* alvenis la ŝokiga famo, ke forpasis sinjoro Stefano Pál. Li naskiĝis en 1926. Li estis ekonomikisto ĉe la Ŝtataj Fervojoj en Miskolc kaj sekretario de la Miskolc-urba Esperanto fakrondo en la Kulturdomo RÓNAI, Sándor. Lian morton kaŭzis kormalsano. Bedaŭrinde li havis nur esperantlingvajn poemojn. El liaj hungarlingvaj prozaj verkoj nur la Historio de la Miŝkolca Esperanto-movado estas esperantigita. Post lia morto evidentiĝis, ke Stefano Pál estis granda kolektanto ankaŭ de dokumentoj pri historio de la Fertvojo de Miskolc. Pri Esperanto aferoj liajn kolektaĵojn gardas la Borŝod-Abauj-Zemplén - Departamenta Arkivejo de la Hungara Nacia Arkivejo. Geedzoj Pásztor vizitis la Arkivejon konvinkiĝi kaj sperti kia estas la tie gardita dokumentaro. Por viziti la Arkivejon en Alsózsolca (3571. Alsózsolca, Kossuth u.149), por rigardi la enhavon de la 17 grandaj paperskatoloj oni devas anonci sin pertelefone: +36-46/407-259. Sed ankaŭ rete estas ebleco peti vizito-tempon ĉe: alsozsolca@bazleveltar.hu

Rememoro pri Stefano PÁL, verkita de s-ino Adri Pásztor, aperis en la retrevuo NHI samjare. Funebran parolon diris dum la adiaŭa ceremonio doktoro Jozefo Halász nome de la fervojistaj esperantistoj. Lia rememoro aperis en la presita revuo de hungaraj fervojistaj esperantistoj.

### En tagĵurnalo de Miskolc

Ekde forpaso de Stefano Pál, en la tagĵurnalo Északmagyarország aperas etaj artikoloj pere de D-ro István Dobrossy (eksa direktoro de la BAZ-departamenta Arkivejo) pri esperantistaj eventoj el la pasinto. La dokumentojn al li transdonis mem Stefano Pál, por komuniki tiujn. Kvankam sinjoro Dobrossy ne estas esperantisto, sed li bone agas por Esaperanto.

**Zamenhof-tagon** ni festis laŭkutime, per florkronigo de la Zamenhof-memor-tabulo.

# Historio de la Esperanto-movado en Miskolc
# 2013

## Prepariĝo

*La 30-an de Januaro 2013-a* okazis la kunveno kaj konsento inter Tibor ÁBRÁM: direktoro de la Miŝkolca Reformacia Gimnazio LÉVAY, József kaj la geedzoj PÁSZTOR por aranĝi esperantlingvan libro-ekspozicion en la gimnazio, je la 8a de oktobro 2013a, okaze de la cent jariĝo de Esperanto en Miskolc. Sinjoro direktoro, parolis pri lia plano: por levi memortabulon al la du pioniroj, kiuj maturiĝis en 1909 inter muroj de la sama konstruaĵo sed ĉe la laŭjura antaŭanto de ĉi gimnazio.

## Libro-donacoj al Eger

Adrienne Pásztor donacis ŝiajn librojn: A Nap, Hold és a Csillagok /La Suno, Luno kaj la Stejoj: hungarlingvan kaj la esperantolingvan volumon titolitan: Danco de Feinoj, al Biblioteko de la Komunuma Domo „BARTAKOVICS, Béla" de Eger, por, ke ilin povu legi homoj ne konantaj la lingvon Esperanto kaj esperantistoj. Ildikó Jámbor sinjorino Somody: la kultura respondeculino de la instituto, dankis tiujn kaj menciis pri ebla libroprezento.

## Prezento de libroj en Eger

La libroprezento okazis la 11-an de Junio 2013-a de la horo 17-a. La libroprezenton aranĝis sinjoro Zoltán Barta, la prezidanto de la Esperanto klubo „Verda Stelo" de la Komunuma Domo BARTAKOVICS, Béla. El la hungarlingva libro laŭtlegis Györgyi sinjorino Gábor Nagy Sándor, la dolĉaĵojn ornamitajn per verdaj steloj pretigis: Elizabeta Bartók sinjorino Kormos. La esperanto-lingvan libron prezentis mem la aŭtorino Adrienne Földi sinjorino Pásztor. Ŝi rakontis pri ŝiaj temoj konigante la mallongajn enhavojn de kelkaj rakontoj, pri ties idea instruaĵo, pri la ĉefrolantoj de la rakontoj, pri la metiejaj laboroj de la skribaĵoj. Post la libro-prezentoj okazis libroaĉetadoj, babiladoj kaj evidentiĝis, ke la libroj atingis la verkistan celon, ĉar ties rakontoj vekis malnovajn travivaĵojn, kiuj meritas la rememoradojn de la legantoj. La libroprezenton partoprenis 15 homoj kaj esperantistoj kaj neesperantistoj kaj el Eger, kaj el Ózd, Szolnok, kiuj esprimis sian deziron, revidi la aŭtorinon Adrienne Földi sinjorino Pásztor kaj ŝian edzon László PÁSZTOR, la ĉiaman esperantiganton de artikoloj, la kunlaboranton de la retrevuo Nordhungaria Informo.

**Grandsignifa daŭrigo kiel inda fermo de la unuaj cent jaroj de Esperanto-movado en urbo Miskolc**

En senco de pritraktadoj la 30-a de Januaro 2013-a kaj la 9-a de Septembro, la geedzoj Pásztor aranĝos ekspozicion de esperantlingvaj libroj kaj periodaĵoj, okaze de la cent jariĝo de ĉeesto de Esperanto en Miskolc.

*Titolo de la ekspozicio*: **100 jara estas la Espereanto en Miskolc 1913-2013.**

*Loko de la ekspozicio*: la Miŝkolca Kalvinana Gimnazio LÉVAY, József: 3530, Miskolc, Kálvin János u.2. teretaĝo.

*Dato:* 08. Oktobro 2013-a.

*Organizantoj estas:* parte de la esperantistoj s-ino Adrienne Pásztor, aliparte la Kalvinana Gimnazio.

*Du malfermajn festetojn* petis aranĝi sinjoro direktoro Tibor Ábrám por, ke „ne okazu granda tumulto”.

Por la gimnazia studentaro la inaŭguro okazu de la horo 11,20.

<u>Por la plenkreskuloj la inaŭguro okazos de la horo 15-a la 8-an de Oktobro 2013-a..</u>

Sinjoro Tibor Ábrám: direktoro de la gimnazio planas prinomi unu ĉambron pri Esperanto kaj apud ties enirejo meti marmoran memortabuleton per nomoj (kaj datoj de naskiĝjaroj kaj jaroj de forpasoj) de D-ro Ludoviko Győry Nagy kaj d-ro Kolomano Kalocsay.

Laŭ la montrita modelo la tabuleto estos ĉ. 1-2 cm dika, drapkolora kun permane ĉizitaj literoj, la formo figuros unu stiligitan flugilon. Rigardante ĝin ni povas pensi kiel flugon de la Sankta animo, sankta spirito, aŭ kiel anĝelan flugilon. Ĝia pleja larĝo povos esti ĉ. 50-60 cm. La tuto konvenas al profilo de la gimnazio. Bela estos. Sub la apudpordan tabuleton surmuran, oni povas meti florkroneton kun esperantolingvaj rubandoj kaj ripeti tiun faron ĉiujare.

*La gimnazio entreprenas pretigi gustumindaĵojn por gastigi la partoprenantojn de la inaŭgura festeto posttagmeza. Ili servos teon, kafon, salajn, dolĉajn kukojn kaj refreŝigajn trinkaĵojn. Krome la gimnazio prezentos senkostan tranoktejon kun matenmanĝo por unu nokto (al la nokto de la 8-a de Oktobro al la 9-a de Oktobro 2013-a) en 3x3 litaj gastoĉambroj al la fremdlandaj gastoj aŭ la malpropksime loĝantaj Hungaroj, kiuj samtage jam ne povus hejmeniri.*

**LA GIMNAZIO AKCEPTOS – LOKE - SUBTENOJN DE PARTOPRENANTOJ DE LA INAŬGURO, AL LA MEMORTABULO**

Ni organizantoj de la evento esperas, ke ĉio estos en ordo, kaj la gimnazio ne pensos poste, ke tro multe elspezis kaj ricevis neniom da rekompenco.

**Decido pri aperigo de libro de Stefano Pál kaj Ladislao Pásztor pri historio de cent jaroj de Esperanto-movado en Miskolc**

En la lastaj du semajnoj ni decidis pri aperigo de la esperantigita libro de la du aŭtoroj. La eldonejo en Székesfehérvár kaj la presejo en Miskolc, rapidege finis la lab-a de septembro orojn, por ke la libro pov u aperi je la 3-a de oktobro, por ke ĝi povu esti ekspoziciebla jam la 4-an de oktobro, do ĝi povu esti donacenbla jam la 8-an de oktobro 2013-a, okaze de la festa evento. Ja, estis nia devo por eternigi la gravan paŝon fare de la gimnazio LÉVAY, József por prinomi lerno-ĉambron pri Esperanto. Krome, ni volis doni ĉi libron en ties manojn kiuj laboris por Esperanto kune kun ni, helpante nian laboron. Ĉi libro estas la dokumento ankaŭ pri ilia laboro. Fine la libro vere aperis, kvankam per makulo de beleco, ja mankas el ĝi la unuaj du paĝoj kaj ni ne havis jam tempon represigi ĝin. La libron eldonis: Holnap Magazin, BAKOS,József. Adreso: 8000.Székesfehérvár, Németh László u.12. fszt. 2. Presis la presejo: Könyvműhely Miskolc.

**La 8-a de oktobro 2013-a**

Jes, alvenis la festa tago de la 100 jaroj de la unua kurso de Esperanto en Miskolc. La esperantistoj kaj la gimnazianoj kune festis la 100 jaran datrevenon de la unua kurso de Esperanto en la urbo. La unuaj du lingvoinstruistoj Ludoviko Győry nasgy kaj Kolomano Kalocsay abiturentiĝis en 1909 en la reformcia gimnazio laŭjura antaŭanto de la nuna gimnazio Lévay, kaj sekve ekde 1913 ili instruis Esperanton en du grupoj. La loko de la kursoj estis en alia loko, en la Ekonomia mezlernejo de la urbo.

Nun laŭ la iniciato de la gimnazio LÉVAY, József okazis inaŭguro de memortabulo apud Esperanto – Ĉambro kaj ekspozicio pri Esperantaj libroj, periodaĵoj, dokumentoj kaj a-aliaj objektoj. La ekspozicion aranĝis la geedzoj Adrienne kaj László Pásztor. La ekspozicion kaj la memortabulon inaŭguris sinjorino **Adrienne Pásztor**, kiu diris festajn parolojn antaŭtag-meze por la gimnaziaj studentoj, posttagmeze por la plenkreskuloj.

*Okaze de la jubileo estis eldonita la libro **Fragmentoj el Historio de Espereanto-movado en Miskolc*** de **István Pál/László Pásztor**, **tradukita de László Pásztor** el la hungara al Esperanto. La memortabulon florkronis sinjoroj **József Eszényi** kiel reprezentanto de HEA, **László Szilvási** de la Esperanto-fondaĵo el Budapeŝto kaj **László Pásztor**, de la Esperanto-Amika Rondo Király Lajos. La jubilean feston plie beligis la Esperantolingva kantado de **Anjo Amika** (s-ino Bartek el Budapeŝto) - pri KD – ĉerpinte el famaĵoj de la Eŭropa-kantokulturo.

La memortabulon subtenis la **Urbestraro de Miskolc** kaj la sekvaj geesperantistoj: **Esperanto-fondaĵo** el Budapeŝto, same el Budapeŝto: **doktoroj Endre Dudich kaj Balázs Wacha,** el Miskolc: **Eva la vidvino de la unua libro-aŭtoro IstvánPál, sinjoroj Gábot Bereti, Johano Orosz, Miklós Fáztold kaj s-ino Maria Busai.** El vilaĝo Szirmabesenyő: **Tereza Csik s-ino Bodnár.** De la EAR Király Lajos: **geedzoj Adrienne kaj László Pásztor**,

**Ildiko Király s-ino d-ro Vu,** s-**inoj Helena Fedor kaj Judit Virányi, Zsuzsanna Gerő s-ino Parkánszki.** El urbo Eger **s-ro Ernő Könczöl,** el Ózd **József Gulyás,** el urbo Tokaj **s-ino Margit Juhász,** el urbo Szolnok sianome **József Eszényi** kaj ankaŭ aliuloj kiuj ne deziris nomigi sin. La prezo de la memortabulo plenumiĝis. Ni scias, ke ĉi memortabulo unika en tuta Hungarujo, subtenata de urbestraro de Miskolc kaj de la bonkoraj hungaraj esperantistoj gardotos en la gimnazio, ĝis la konstruaĵo staros.

La feston okaze de la 100 jariĝo de la urba Esperanto-movado partoprenis 85 homoj, la ekspozicion rigardis pli ol cent, kaj al ĝi venis pli ol 46 salutoj, gratuloj de diverslandaj esperantistoj. Jen: Prezidanto de UEA **Mark Fettes,** vicprezidanto de UEA **Stefan Mc Gill**, prezidantarano de UEA el Pollando: **s-ino Barbara Pietrzak** , prezidantarano de UEA el Koreo s-ro **Lee Jung Kee**, prezidantarano de UEA el Arnoldstein Aŭstrio: **Martin Stuppnig**, la pli frua prezidanto de UEA: s-ro profesoro **Probal Dasgupta**, la menciitan prezidanton antaŭanta prezidanto de UEA: **Renato Corsetti** , **Osioka Taeko nome de Esperanto Centro de Hirosima** el Japano, de la Esperanto-Muzeo en Vieno en Aŭstrio: **Tuider Bernhard**, **Armin Grötzner kaj sia Esperanto-klubo** same cent jara en Kronach Germanio, el ĝemelurbo de Miskolc el Tampere Finnlando: **Sylvia kaj Veli Hämäläinen. Gesinjoroj Zsófia Kóródi kaj Peter Zilvar kune kun la bildkarton subskribintaj kvin geesperantistoj diverslandaj** el la Esperanto-urbo Herzberg am Hart en Germanio, esperanto-kluba prezidantino el Kopenhago Danio: **Betty Chatterjee** , delegito de UEA el Belgio: **Germain Pirlot**, **Omez kaj Cecilia Sinnaeve**: el Breden Belgio. El Svedio: **Esperranto klubo de Helsinborg,** el Tirana Albanio: **Bardhyl Selimi, Esperanto-klubo** el Nowy Sącz Pollando, studentino de la Arta Altlernejo en Krakovo Pollando: **Lidia Komar,** prezidantino de la Interkultura Eduka Centro en Nowy Sącz Pollando: **Halina Komar** , bibliotekistino el Gostyn Pollando: **Halina Radota**, Esperanto-klubprezidanto kaj prezidantarano de PEA en Łodz Pollando: **Robert Kaminski**, El Ijhevsk Udmurtia el la Rusa Federacia Ŝtato: **Bronislav Ĉupin** ,Esperanto-klubprezidantino en Trieste Italio: **Elda Doerfler**, organizanto de Esperantolingvaj programoj kaj prezidantarano de E-o Asocio en Slovakio: **Peter Balaž**, ĉefredaktoro de revuo ESPERANTO: **Stano Marĉek** el Slovakio, organizanto de lingvaj aranĝaĵoj en sia patrolqando: **Jindriŝka Drahotová** en Skokovy Ĉeĥujo, de **Bert Schuman**: sekretario kaj organizanto de Eo temaj kulturaj eventoj en kastelo de esperantistoj en Gresilljon Francujo, de s-ino **Gabriella Stier** el Satu Mare (Nagyszeben) el Rumanio, de **Stefan Viktor Budaházy:** Esperanto-kluba prezidanto en Oradea Rumanio, de **Lajos Asztalos** el Cluj-Napoca (Kolozsvár)el Runanio, de s-ino**Tereza Kapista:** esperantokluba prezidantino en Beograd Serbio kaj instruistino petita de UEA por instrui en Afriko, el Brazilo, de **Liette Lela,** de la muzikofaka instruistino el Argentino: **Livia Barth-Neuman**. Krome de **La Bona Volo** el Brazilo, **La Bona Espero** en Brazilo, **Tivadar Löwenkopf:** delegito de UEA en Izraelo, de l**a HEA el** Budapeŝto, de **Gedoktoroj Lajos Molnár Lajos** kaj lia edzino **Julianna Farkas** nome de ilia **Esperanto-grupo de Medicinaj Esperantistoj** en Budapeŝto**,** de **László Gados**: kiel redaktoro de la hungarlingva E-on reklama gazeto - Nyelvi Hírek/Lingvaj Novaĵoj - aperanta en la hungara ĉefurbo Budapeŝto**.** Krome de **Péter Tihanyi:** Esperanto-klubprezidanto nome de la de li gtvidataj esperantistoj el urbo Tatabánya Hungarujo**,** el la ungara urbo Nagykanizsa, la esperant5ista verkisto arta tradukisto: **Tibor Szabadi,** el la hungara urbo Hódmezővásárhely: **Faragó Kata** iu estrino de Internacia Grupo de la Yumeiho-speciaj kurac-gimnastikistoj, de s-ro Esperanto-klubprezidanto sinjoro **Barta Zoltán** kaj liaj klubanoj el urbo Eger, de **Andrzej Grzebowski:** kiel organizanto de Esperanto-instruado kaj turismo de esperantistoj en Bydgoszcz Pollando kaj de mulraj aliuloj.

Pri la rezulto de niaj porfestaj agoj kaj la opiniojn pri la sukceso de la festa programo aranĝita de geedzoj Pásztor, ni aperigos artikolojn kaj en la retrevuo Nordhungaria Informo kaj en organo de UEA en la revuo ESPERANTO. Krome hungarlingve ni provos meti ĝin en la BAZ-departamentan Arkivejon, por gardigi ĝin.

**La jaran poresperanto agadon de la EAR Király Lajos, ni fermos** per partopreno de la Zamenhof-taga festo aranĝota de HEA en Budapeŝto, kaj, per la modesta rememoro pri Zamenhof kaj la jaro jubilea en Miskolc. Pri ties tempo ni sendos informon.

Fine ni; la geedzoj Pásztor esprimas nian kordeziron, ke Esperanto havu gravan lokon en Miskolc ankaŭ en la estonto. Esperanto havu ĉiam neritindan posteularon, kiu povos alten teni la verdan stelan flagon de la Amikeco, la Paco kaj la Universala Homa Kulturo!

Miskolc, 30. decembro 2013.

Ladislao Pásztor



PÁSZTOR, László (laŭ esperantlingva eldiro: Ladislao Pastor) naskiĝis en 1940 en Hungarujo. Li finis ĉeflernejojn kaj diplomiĝis kiel ĝardenistfaka uzin-inĝeniero kaj instruisto. En agrikultur-faka mezlernejo en Miskolc ĝis lia pensiuliĝo en 1997, li instruis la studobjektojn frukto- kaj vinberkutivadoj. La lingvon Esperanto li komencis lerni en 1969, de Stefano Pál. Li faris ankaŭ Co ekzamenon ĉe HEA, por instrui Esperanton, kion li plenumis plurfoje krom lia plurjara aktivado kiel Esperanto kluba sekretario. Lia Co-diploma diplomverko estis prilaborado de tiuj temoj.

En 1975 li geedziĝis kun fraŭlino Adriennne Földi. Ekde 2005 ili kune funkciigas la retrevuon Nordhungaria Infrormo kiu servas kiel informilo de la Miŝkolca Esperanto-Amika Rondo Király Lajos. Ĉi tiu traduko estas lia sola esperantigo aperinta presite. La fragmentoj … estas grava verko dokumentanta cent jarojn de la poresperanto-laboro en Miskolc. Krom ĉi tiu verko devenas de li esperantigoj de urbhistorioj de Miŝkolco kaj Mezőkövesd, historioj de Miŝkolcaj preĝejoj, galerioj, muzeoj, multe da artikoloj el diversaj gazetoj. Krome li esperantigis de ses hungaraj aŭtoroj sep verkojn. La lastaj estas nur manuskriptoj, atendantaj eldonon. Li estas bona helpanto de lia edzino por aranĝi Eo-lingvajn memorfestojn kaj en Miskolc kaj en Abaújszántó.